1B 6046 C X

# SEMAJNO

internacia magazino sendependa

3,– gmk
0/78
1 septembro 1978



## Terorismo mondvasta

Kiel kontraubatali ĝin?



# Malnovrusaj Ikonoj

**reproduktitaj laŭ motivoj de l' 15a jarcento**



Apostolo Petro
sur ligno
17,5x31x3 cm

Madono kun Infano
sur ligno
30,5x 23,5x3 cm

Dank' al eksterordinare komplika produktmaniero nun estas eble, posedi majstroverkon de malnovrusa arto sen elspezi sian tutan havaĵon.

Bonvolu mendi per poŝtkarto aŭ eltondi kaj en koverto sendi al

**Fa. M. RUDOLPH, Singerstraße 1, D-8900 Augsburg**

| | |
|---|---|
| _____ ekz. Madono kun Infano | prezo 320,– gmk |
| _____ ekz. S-ta Petro | prezo 290,– gmk |
| _____ ekz. S-ta Paŭlo | prezo 290,– gmk |

ĉiuj prezoj inkl. imposto, pakmaterialo kaj afranko
pagu dum 14 tagoj post alveno de fakturo
rajto je redono dum 10 tagoj
poŝtĉekkonto München n-ro 3257 61-805

# SEL

garantio por
solida Esperanto-laboro

Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL)

- arangas **Kulturajn Semajnfinojn** dufoje jare (la sekvaj: 29. Sept. 1 Okt. kun D-ro Tazio Carlevaro; Majo 1979 kun D-ro Marjorie Boulton);
- eldonas kvaronjaran kulturan-literaturan **revuon DIALOGO**;
- eldonas **Esperanto-librojn** (i.a. de Wingen, Kalocsay, Boulton, Auld, de Diego, Rossetti, Varankin, Ribillard, Wüster k.a.);
- gvidas internacian **libroservon** kun larĝ-paleta sortimento;
- plenumas **informan laboron** pri Esperanto en FRG.

Petu senpagajn programojn, prov-numeron aŭ libro-katalogon ĉe:

Sarlanda Esperanto-Ligo
Franz-Schubert-Straße 26
D-6602 Dudweiler

Tel. 0 68 97 / 7 82 46
pĉk Saarbrücken 53 58-663

Estimataj gelegantoj,

ĉi tiu numero de SEMAJNO kompreneble ne donas al vi ĝustan impreson. Unue ĝi atingas vin ne - kiel poste dum regula aperado ekde 1979 - jam kelkajn tagojn post preso, sed verŝajne nur semajnojn, ja monatojn post la aperdato. Do vi ne povas havi la impreson de aktualeco, grava karakterizo de SEMAJNO estonta. Due vi komprenu, ke la enhavo de provnumero ne estas reprezenta por enhavoj de regulaj numeroj. Kaj ankaŭ povas esti, ke jen kaj jen troviĝas ankoraŭ teknikaj neperfektaĵoj en ĉi tiu numero 0.
Sed malgraŭ tiaj ĝenoj neeviteblaj, vi jen tenas en viaj manoj ekzempleron de SEMAJNO, per kiu vi povas ekkoni kaj prijuĝi la karakteron de nia magazino, ĝis nun unika en la internacia lingvo. Se vi atente studas ĝin, vi baldaŭ rimarkos ne nur, ke ĝi estas plena de interesaj raportoj kaj informoj el gravaj kampoj de politiko, ekonomio, kulturo, tekniko kaj scienco, sed ankaŭ ke ni, la redakcio de SEMAJNO, volas eldoni ne nur magazinon por sed ankaŭ kun vi, la legantoj. Ni invitas vin ĉiamaniere kunlabori.
Tamen ni ankaŭ volas eviti eventualan miskomprenon: SEMAJNO ne anstataŭas, kvazaŭ kiel supera E-revuo, la ekzistantajn periodaĵojn pri kaj por Esperanto. En nia magazino vi ne trovos multajn Esperantaĵojn; pri la E-movado multe pli bone informas niaj kolegoj de la ekzistantaj E-revuoj.
Do multan plezuron kun SEMAJNO, kies abonanto vi certe baldaŭ estos.



Stefan Maul

Sincere via
Stefan Maul

ENHAVO DE L' SEMAJNO — paĝoj


ĉefartikoloj
**Terorismo mondvasta** 8-12
Nova skurĝo de l' homaro sendube estas terorismo. Por kontraŭbatali, oni unue devas analizi ĝin: Kiel kaj kial homoj fariĝas teroristoj?

**La unua medalo estas aĉetebla** 14
Kiel Moskvo preparas la Olimpiajn Ludojn en 1980

**Hispanio: proprastila demokratio?** 17

**La arto fariĝi 134jara** 18-19
Gerontologio, juna scienco pri maljuniĝo, disponas pri gravaj ekkonoj. Sed ĉu vere estas dezirinde, fariĝi metuzalemo?

OPINIO DE L' SEMAJNO: **Afriko perturbata** 13

RAPORTOJ DE L' SEMAJNO 20-30

rubrikoj
NOTICOJ 4-5
KRONIKO/LETEROJ 6
LEKSIKONO 17
LIBROJ 30
KONGRESOJ/HOBIO 33
KUIR-RECEPTO 34-35
TURISMO 37
RADIOPROGRAMOJ 38

specialaĵoj
Paĝo de junularo 16
Memoroj – por grizuloj 25
Por infanoj 34

distraĵoj
SATIRO 7
Kolumno de legantoj 29
NOVELO: La piedirantaj anĝeloj 31-33
Krucvortenigmo 38
Kiu estas? 39



**Kiel vi povas aboni ĉi tiun novan magazinon, vi ekscias sur paĝo 35. Kiel vi povas kunlabori, vi ekscias sur paĝo 36.**



SEMAJNO internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo – aperas ĉiun semajnon (50 numeroj po jaro) – prezo: 3,– gmk – jarabono: 150,– gmk (inkluzive sendkostojn) – eldonejo S. Maul – adreso: SEMAJNO, S. Maul, Singerstraße 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio – telefono (08 21) 57 34 85 – poŝtkonto Nbg 650 92-858 – bankkonto Bayer. Vereinsbank (bank-kodo 720 200 70) 812 0900 – valida anonctarifo: n-ro 1 – presejo M. Rudolph, Friedberg – Postverlagsort: Augsburg – direktoro de SEMAJNO (verantwortlich für den Inhalt): Stefan Maul

Ĉe la lazura marbordo

HOTEL MIRON ** NN

4, Rue Miron F-06000 NICE
Tel. 93.85.22.68
komfortaj ĉambroj
kun banejo aŭ duŝo
telefono en la ĉambroj
lifto – televido
– Esperanto parolata –

Se SEMAJNO plaĉas al vi, diru tion al aliaj!

Se SEMAJNO ne plaĉas al vi, diru tion al ni!

SEMAJNO

KOLEKTANTOJ – Sendu vian trilinian tekston por senpaga enpresigo en LA ESPTERANTISTA KOLEKTANTO kaj petu samtempe specimenon kontraŭ bela filatela afranko al la eldonanto: R. MELO, 34 Avenue de Russie, F-03700 Bellerive, Francujo

Chemische Fabrik
BRUNO VOGELMANN
D-7180 Crailsheim/Germanujo

higieno
desinfektado
aerrefreŝigilo
tualetpurigilo
tubopurigilo
senkrustigilo
purigiloj
plankoflegado
herbicidoj
razenpurigilo
betonhardigilo
likvaj sapoj
tineo-ekstermilo
plantokreskiloj
tankprotektilo

Chemische Fabrik
BRUNO VOGELMANN
Pistoriusstraße 48-50
D-7180 Crailsheim
Tel. 07951/21045
Pĉk: Stuttgart Konto 66314-706

## NOTICOJ DE L' SEMAJNO

### Nigra listo

Internacia Labor-Organizo (ILO) en Ĝenevo kompilis „nigran liston" de 13 ŝtatoj, kiuj ne plenumas siajn internaciajn devojn en la sociala sektoro. Temas pri Afganio, Benino, Ĉado, la Arabaj Emiratoj, Gvatemalio, Gvineo, Jordanio, Kosta-Riko, Laoso, Malavio, Malto, Nepalo, Tanzanio. Dua listo enhavas ok ŝtatojn, kie la situacio estas zorgiga: Argentino, Ĉilio, Etiopio, Haitio, Indonezio, Turkio kaj Urugvajo.

### Bovo unuaklasa

Malbone eble kalkulis la iama aŭstralia komerc-ministro Howard. Li asertis, ke bovviando el Aŭstralio estus pli malmultekosta kompare al (subvenciata) viando de la Eŭropa Komuno, eĉ se oni transportus aŭstralian bovon unuaklase per aviadilo al Eŭropo. Dum ses monatoj la bruselaj fakuloj kalkulis kaj nun venis al la rezulto: Komparebla bovo el Britujo kostas 300 pundojn; sed la flugbileto de Melburno al Frankfurto kostas 729 pundojn. Eble dum tiuj ses monatoj, kiujn la eŭrokratoj bezonis por sia kalkulado, iu inflacio ne estis priatentita . . .



*Meze en turkaj vilaĝoj oni renkontas ĉi tiajn maljunegajn, gigantajn platanojn. Nia foto montras unu el ili, proksime de Bursa ĉe Apolonia-lago.*

### Malnova fiŝo

Laŭ propra indiko usonaj sciencistoj malkovris la fosilion de la supozeble plej malnova fiŝo de la tero. Ĝi vivis antaŭ ĉ. 510 milionoj jaroj. Oni trovis ĝin en la usona ŝtato Wyoming (pr. Vajoming). Ĝi estas 40 milionojn jarojn pli malnova ol la ĝise konataj vertebruloj.

### El Israelo al Mekko

La unuan fojon post fondiĝo de la ŝtato Israelo antaŭ 30 jaroj, dum oktobro ĉijara araboj el ĉi tiu lando rajtas pilgrimi al Mekko. En la juda ŝtato vivas ĉ. 500.000 araboj, kiuj je 80 procentoj estas islamanoj.

### Hejm-atombombo

Kion Dimitri A. Rotow kompilis legante en publikaj bibliotekoj, la usona registaro volas kaŝi en sekura ejo. Kaŭzo estas, ke la 22jara studento tiamaniere trovis recepton por konstrui atombombon hejme. Tamen li ne agis tiel por

konstrui bombon, sed por atentigi pri la facilanimeco de la instancoj: Ĉiu iomete instruita homo povas mem eltrovi konstruplanon per ĉie haveblaj libroj, li asertas.

**Pli multaj katolikoj**

Laŭ nun en Vatikano publikigita statistiko dum la jaro 1976 vivis en la tuta mondo 724.434.000 katolikoj; dum unụ jaro kreskis la nombro je 15 milionoj. En Ameriko vivas 350 milionoj (62 procentoj de la loĝantaro), en Eŭropo 263 milionoj (40 procentoj) kaj en Afriko 50 milionoj (12 procentoj).




*„Mond-novaĵo" el Britio estas ĉi tiu poŝtradukilo – inventoj kontraŭ lingvoproblemoj abundas, sed solvo ekzistas nur unu . . .*

**Multekostaj lingvoj**

60 procentoj de la personaraj kostoj de la Eŭropa Parlamento estas kaŭzataj per la plurlingveco. 152 milionoj gmk ĝi kostas ĉiujare.

**Perforta Naziismo**

Laŭ la plej freŝa raporto de la ministro por internaj aferoj en FR Germanio faŝisma ekstremismo ne estas „vera danĝero por ŝtata kaj socia ordoj". Tamen oni konstatis, ke lastatempe kreskis novnaziisma aktiveco kaj oftiĝis perfortoj per radikalaj naziistoj. Frape ankaŭ estas, ke oni vendas multajn naziismajn simbolojn, embelmojn k. s. Ne malpli ol 43 juĝaj kondamnoj pro tiaj deliktoj estis registrataj dum lasta tempo. Aliflanke la naziisma partio perdis multajn membrojn, dum la Komunista Ligo Okcidentgermana sukcesis draste pligrandigi sian membronombron. La radikaliĝo de naziismaj grupoj estas sekvo de la malsukceso de la naziisma partio, kiu havas nur ankoraŭ 9.000 membrojn. (Antaŭ kelkaj jardekoj ĝi havis eĉ deputitojn en pluraj landaj parlamentoj.)

**Eŭropo aĉetas Usonon**

Svedoj, germanoj kaj francoj aĉetas plej ofte farmojn kaj areojn en Usono. Sole lastjare ili elspezis ĉ. 8,4 milionojn dolarojn por tiu celo, laŭ takso de la usona financadministracio.

**Rusa lingvo ŝatata**

Ne malpli ol 16.000 gimnazianoj (el entute 2 milionoj) en FR Germanio lernas la rusan lingvon. En 90 gimnazioj ĝi estas dua kaj en 258 tria fremdlingvo.

**Atom-milito 30minuta**

Usono posedas duoblan kvanton de strategiaj nuklearmiloj kompare al Sovetunio, tamen neniu el ambaŭ superpotencoj povus venki per atom-milito. La usona eksadminralo Gene la Rocque antaŭ la UN-asembleo diris: „En nuklea milito ĉiu nacio povus ekstermi la alian dum 30 minutoj."

**Bonaj aŭtomobilistinoj**

La miton, ke virinoj estas malbonaj ŝoforinoj, ekzamenis dana sciencisto. Rezulto: Se ĉiuj viroj ŝoforus tiom sekure kiom virinoj, la akcident-kvoto estus je 20 procentoj pli malalta. Bazo de la esplorado estis 70.000 akcidentoj en Danlando. Supozeble ĉi tiu rezulto validas ne nur por gedanoj.

**Sinkanta pezo**

Strangan fenomenon konstatis la san-oficoj: Tutmonde sinkas la pezo de beboj ĉe l' naskiĝo. Rezulte de tio la novnaskitoj pli malbone prosperas. Tial en pluraj landoj oni nun ekzamenas la fenomenon. Oni supozas, ke profesia laboro kaj fumado de patrinoj estas inter la kaŭzoj.

**Fumkostoj**

Fumantoj en tuta mondo blovas ĉ. 100 miliardojn dolarojn pojare en la aeron. Dum kontraŭfuma konferenco en Novjorko oni atentigis pri la precipa danĝero en evoluantaj landoj: Tie fumado populariĝas, ĉar ĝi ŝajnas simbolo de certa bonfarto. Intertempe konatiĝis, ke eŭropaj cigaredfabrikoj eksportas al tiuj landoj cigaredojn kun tro multaj damaĝ-substancoj. Ĉar tiaj cigaredoj estas malpermesitaj en la plej multaj industriaj landoj, oni vendas ilin al tiuj ŝtatoj, ĉefe afrikaj. Nova maniero de rasdiskrimnacio?

**Ankaŭ Francio**

Post pluraj aliaj eŭropaj landoj, nun ankaŭ Francio enkondukis pli severan leĝon koncerne ŝoforadon sub alkohol-influo. Ankaŭ en ĉi tiu lando nun validas limo de 0,08 procentoj de alkoholo en sango; ĝis ĉi tiu limo oni rajtas konduki aŭtomobilon, se estas pli alta koncentriteco, la koncernan personon atendas severaj punoj: ĝis 0,12 procentoj malliberigo ĝis unu monato aŭ monpuno ĝis 1.000 frankoj; se estas pli ol 0,12 procentoj, punoj inter unu monato kaj unu jaro estas eblaj (monpuno inter 500 kaj 8.000 frankoj). Krome policistoj nun rajtas kontroli je alkoholo ne nur ĉe akcidento, sed ĉiumomente.

# KRONIKO

## DE L' SEMAJNO 33/1978

8/14: Pro demonstracioj kaj ribeloj en **Irano** la registaro funkciigas en pluraj urboj la militan juron; ribelas religiaj kaj maldekstraj opozici-grupoj.

8/15: Ampleksan „raporton pri l' monda evoluo“ prezentas la **Mondbanko;** i.a. ĝi enhavas la prognozon, ke dum la jaro 2000 vivos 600 milionoj da homoj en „absoluta“ malriĉeco“ (hodiaŭ 800 milionoj).

8/16: La ĉina partiestro **Hua Kuo-feng** alvenas en Bukaresto, Rumanio, unua stacio de sia eŭropa vojaĝo; li krome vizitos Jugoslavion kaj Iranon.

8/17: La usonaj aeronaŭtoj B. Abruzzo, M. Anderson kaj L. Newman per sia **balono** Duobla Aglo surteriĝas proksime de Parizo post sestaga ŝvebflugo. Por la unua fojo per balono tiel sukcesis superi la Atlantikon de Usono al Eŭropo.

8/18: La **usona dolaro** konstante senvaloriĝas kompare al eŭropaj valutoj, ĉefe svisaj frankoj kaj germanaj markoj, sed ankaŭ japanaj jenoj. La dolaro nun egalas al 1,9290 gmk. La usona registaro deklaras, ke oni pensas pri kontraŭrimedoj.

8/19 En la irana urbo **Abadano** per fajro en kinejo mortas 377 homoj. Laŭ oficiala informo temis pri atenco de ribeluloj. Estas unu el la plaj grandaj brulkatastrofoj de la historio.

8/20: Per vizito de ŝtatestro Neto el **Angolo** en **Zairo** ambaŭ, ĝis nun malamikaj landoj afrikaj manifestiĝas repaciĝo inter ĉi tiuj du grandaj ŝtatoj.
Post instalo de diplomataj reprezentantoj nun oni refunkciigas la fervojon inter Zairo kaj Angolo.

# LETEROJ AL SEMAJNO

**Rimarko:** Kompreneble ankoraŭ ne alvenis leteroj al la redakcio de SEMAJNO pro iuj artikoloj aperintaj, ĉar ĉi tiu ja estas la unua numero. Tamen ni ricevis multajn leterojn, kiuj okupiĝas pri la projekto de nia magazino mem, do tamen leteroj al SEMAJNO. Sed ĉar ne temas pri leteroj de legantoj en ordinara senco, ni ĉi-foje aperigas ilin sen nomoj. Se vi sendos leteron destinitan por publikigo, bonvolu indiki la rubrikon „Letero al S.“. Ni esperas, ke en la unua regula numero ni havos interesajn kaj ĉiutemajn leterojn.
Redakcio

Mi tre admiras vian kuraĝan elpaŝon, kaj arde esperas, ke via kuraĝo estos pravigita, kaj ke SEMAJNO havos grandan sukceson. W.A.

Ĉu SEMAJNO vere respondas al bezono de la nuntempa esperantistaro? Jam estas – laŭ mia opinio – tro da esperantlingvaj gazetoj! Ĉu SEMAJNO povos alporti, konkrete, ion pli ol la plej gravaj nacilingvaj magazinoj? L.G.

Mi devas sincere diri, ke mi estis tre surprizita (kompreneble, pozitive), ke vi kuraĝas entrepreni ion tian. Kun grandega intereso mi atendos la numeron nulo. Dezirante al vi nur sukcesojn, mi kores salutas. A.S.

Certe estas tre urĝe bezonata tia aktuala gazeto! J.J.

Mi ne bezonas diri al vi, ke tian revuon ni vere bezonas, nun eble eĉ pli ol antaŭ kelkaj jaroj, kaj mi same ne bezonas emfazi, pri kia granda eksperimento temas. Necesos verŝajne longa periodo por venki la tradician malfidon de la esperantistoj al novnaskita revuo. Tion dirinte, mi tuj volas akcenti, ke la merkato por neesperantisma politika revuo ŝajnas esti relative larĝa. Vi aŭdis pri la eksploda interesiĝo pri Esperanto en Irano: De tie jam venis multaj plendoj, ke por la miloj da studentoj lernantaj la lingvon ne troviĝas legmaterialo en Esperanto, kiu respondas al iliaj interesoj: nome scienca literaturo kaj aktuala, neesperantisma kaj neeŭropcentrisma revuo. Se vi aparte konsideras la motivojn de esperantistoj en la Tria Mondo, tio povus konsiderinde kontribui al sukcesigo de la projekto. U.L.

SEMAJNO **devas** fariĝi bona!
H.K.

Vere, mi estis tre pozitive surprizita, kaj M. kaj mi estas tute samopiniaj ke tia semajna revuo en la Internacia Lingvo, sed ne pri-Esperanta, estas nepre gravega celo! Do, gratulon al vi pro la iniciato kaj kuraĝon por la sekvantaj paŝoj! U. M.

Permesu al ni rimarkigi, ke SEMAJNO tamen ne estas la unua ĉiusemajna revuo en Esperanto: Heroldo de Esperanto antaŭ la lasta milito aperis regule ĉiusemajne (dum mallonga periodo eĉ ĉiutage!). Bedaŭrinde mi serioze dubas, ĉu la hodiaŭa Esperanto-movado kapablos porti revuon tiom ambician, kiom estas SEMAJNO. Sed, trovante, ke estus ege bone por la Esperanto-movado, se via plano povus sukcesi, ni almenaŭ plezure faros nian eblon por ĝin diskonigi en nia lando.
C.S.B.

Mi konsideras vian inicion grava kaj tial respondas plej otimisme. Min interesus ekscii, kiom ni devus alpagi, se vi sendus la numerojn de SEMAJNO aerpoŝte. V.S.
(Respondo de la redakcio: Vi nenion devas alpagi, ĉar kompreneble ni ekspedas aerpoŝte, kie necesas.)

Jam de kelka tempo mi esperas aktualan revuon, kiu pritraktas ne nur E-movadajn aŭ E-fakmovadajn temojn, sed ankaŭ – pli bone: ĉefe – ĉiuspecajn internaciajn novaĵojn. Do, „normalan“ esperantlingvan gazeton aŭ magazinon. H.W.

## Radikala Mezo

Mi proponas fondi novan universalan partion: „Radikala Mezo". Ne estas originala mia ideo, sed fondis ĝin jam tuj post la Dua Mondmilito geniulo Werner Finck, fama germana kabaretisto. Sed ĉar li ĵus mortis, mi volas pluportI lian torditan torĉon, ankaŭ tial ĉar li restis fiaska – rilate la partion „Radikala Mezo".

Supozeble tiam la homoj ankoraŭ ne estis politike maturaj por tia radikala partio. Sed intertempe ja preskaŭ ĉiuj homoj estas tiom mezgradaj, ke mi certe havas bonajn ŝancojn kolekti kolektivon de fervoraj partianoj.

Vidu, „Radikala Mezo" ja havas ĉiuspecajn pecajn avantaĝojn. En la mezo oni ĉiam sentas sin bonfarta, kaj kiu ne volas stari en la mezo de l' atento? (Ne en centro, cetere, ĉar tie estas loko nur por unu persono, kaj mi ja ne volas havi diktatoron, nur la diktaturon de la mezeco!) Se do nun ĉiuj estas en la mezo – jen la perfekta feliĉo tuthomara!

Kompreneble ĉi tiu mezo devas esti, aliflanke, „radikala". Ne nur ĉar tiel oni altiras ankaŭ ĉiujn radikalulojn, sed ankaŭ ĉar radikalo enhavas ion elitan – kaj kiu ne volas esti elita? Krome per kombino de „mezo" kaj „radikalo" oni finfine povas forigi la tension inter neŭtrala kaj neneŭtrala sintenoj. Mezo ja estas tutcerte io neŭtrala, dum radikala ne toleras ion alian, do estas neneŭtrala. Jen do solvo simila al kvadratigo de l' cirklo – kaj tiel eĉ matematikistojn mi gajnos por mia nova partio!

Ankaŭ la lingvan problemon oni tre simple povas solvi per tia partio, ĉar „radikala" ja deriviĝas de „radiko". Sed laŭ mia scio ekzistas nur unu radika lingvo, do lingvo kies vortrezoro konsistas el radikoj. Tiun radikalan lingvon do kompreneble uzos la nova partio, radikale!

Tial do mi apelacias al vi: Radikaluloj kaj mezuloj de ĉiuj landoj, unuiĝu! Vi nenion povas perdi!

Skorpiono

---

Edziĝis komunista Onassis,
la homojn jen embarasis.
Sed kial nur tia famo?
Ja estas tutsimple nur amo:
eĉ muso kun miliardo
strebas al fromaĝo kaj lardo.

stef

**AFORISMOJ**

Hodiaŭa kruco de l' homaro: nord-suda, orient-okcidenta.

Retortaj infanoj en Britio vivas kontraste al sentortaj infanoj en Hindio.

Ŝtatviroj ofte estas nur ŝatviroj: ili ne ŝatas ŝtaton sed nur propran staton.

**Diplomatoj**

difinitaj de diplomatoj


1. Diplomatoj estas homoj, kiuj raportas pri landoj, kies lingvojn ili ne komprenas.
2. Diplomataj raportoj tial restas sekretaj, por ke la eraroj de l' aŭtoroj ne konatiĝas, dum ili ankoraŭ vivas.
3. Post prostituo la dua plej malnova negoco estas diplomatio kaj prave same fifama kiel la unua.

---

La registaroj pompe sin UNESKis
Por paca kunlabor' – sed efektive
Montriĝas: ESK signifas nur
„ŝajniga",
Kaj UNuecon baras stulto diga.

William Auld

(„El unu Verda Vivo", Lingvo-ponto, 1978)



*Rimedo por sekurigi ministeriojn, ambasadejojn kaj vilaojn kontraŭ teroristoj: Se ili alkuras, ili kaj stumblas kaj vekas la gardiston (Rekomendo de UN-asembleo).*

# Terorismo mondvasta

**Provizora kulmino de nuntempa terorismo sendube estis kapato (kum murdoj) kaj murdo de la itala partiestro Aldo Moro. „Provizora" – ĉar dum estas skribataj ĉi tiuj linioj, eble la internacia terorismo jam havas alian viktimon. Eminentan viktimon, ĉar ne tiom eminentajn viktimojn teroristoj preskaŭ ĉiuhore trovas preskaŭ tutmonde.**

Estas pli facile, listigi la landojn kie ne regas terorismo, ol kompili liston de ŝtatoj, kiuj jam dum jaroj vivas kun terorismo – pli ĝuste: kie mortas homoj per teroristaj atencoj. Sistemo kaj metodoj de internacia terorismo preskaŭ ne ŝanĝiĝis dum jardekoj, nur kaŭzoj kaj motivoj diferencas. Ankaŭ dependas de la politika vidpunkto, kion oni difinas „terorismo" aŭ eble (pravigebla) „revolucio". Batalo de liberigaj grupoj kontraŭ diktaturoj, eĉ se ili aplikas teroristajn metodojn, en okuloj de iuj estas legitima, dum – komprenéble – la koncerna diktatoro tuj denuncas tiujn grupojn teroristoj. Sed sendepende de ĉi tiu nur malfacile solvebla dilemo, fakto estas ke terorismo hodiaŭ pli multe ol iam dum la moderna historio estas mondvasta fenomeno. De Israelo, kie jam dum jardekoj terorismo estas ĉiutagaĵo, ĝis Norda Irlando, kie nun precize dek jarojn „katolikaj" irlandanoj mortpafas „protestantojn" kai inverse, de Turkio ĝis Argentino – teroristoj kaj iliaj aktivaĵoj plenigas la kolumnojn de ĵurnaloj. Kaj ne malmultaj homoj en tiuj kaj en ĉiuj landoj nur ankoraŭ legas la titolliniojn de la raportoj – se entute ili interesiĝas pri terorismo. Nur se temas pri „impona" ago, ekzemple forrabo kaj murdo de ŝtatestro kiel Aldo Moro, tuta nacio kaj grandparto de l'mondo terurigita sekvas la evoluon de la afero. Kaj se – kiel an Mogadiŝo (Somalio) – special-brigado venkas teroristojn, oni laŭdas kaj aplaŭdas eĉ ŝtaton, kiun oni volonte denuncas militarisma; kiam la sama ŝtato, Federacia Respubliko Germanio, dum la Olimpiaj Ludoj en 1972 fiaskis ĉe la provo, liberigi la kaptitajn israelajn atletojn, ĝi rikoltis riproĉojn pro malforteco.

Kiam post la murdiĝo de la germana ekonomia potenculo Schleyer (pr. Ŝlajer) la parlamento en Bonn diskutis pri pli akraj leĝoj kontraŭ teroristoj, estis ĉefe italaj gazetoj, kiuj riproĉis al la iama milit-kunulo regliti en faŝismon, kaj ankaŭ el la amika Francio venis mirige rigoraj kritikoj. Sed kiam en Parizo oni forrabis belgan ekonomian potenculon kaj en Romo ŝtatestron, jen subite ambaŭ registaroj agadis multe pli rigore, sen antaŭe – kiel en Germanio – diskuti novajn leĝojn. Se du agas same, ne ĉiam estas same.

Jen ilustrado, kiom da facetoj havas la fenomeno terorismo. Difini kaj analizi ĝin provis jam multaj politikistoj, kriminologoj kaj psikologoj, historiistoj kaj eĉ psikiatroj, sed analizon taŭgan por ĉiaj teroristoj ĝis nun neniu povis doni.

Se oni rigardas ekzemple la aĝojn de teroristoj, oni konstatas ke ĉefe temas pri gejunuloj inter 20 kaj 35 jaroj – sed en separatistaj naciistaj grupoj kiel IRA aŭ la vaskaj ribeluloj troviĝas ankaŭ infanoj kaj grizuloj. Simile en ĉiuj teroristaj bandoj, de Ruĝaj Brigadoj en Italio kaj Tupamaroj en Urugvajo ĝis usonaj Weathermen (pro. Vevermen) kaj japana Ruĝa Arme-Frakcio, regas intelektuloj. Tamen ĉe IRA en Norda Irlando tute alie: Gvidas ĝin neniuj intelektuloj.



*Pri la murdiĝo de Aldo Moro (supre la loko, kie oni trovis lin) . . .*

Aŭ ni esploru la socian devenon: Germanaj teroristoj kutime vivis antaŭe en bonsituaj mezklasaj familioj. Sed en aliaj landoj teroristoj rekrutiĝas grandparte el subaj sociaj tavoloj. Kaj ĉe la sekso estas ankaŭ diferencoj: Inter arabaj kaj germanaj teroristoj troviĝas multaj virinoj (ĉe germanaj estas proksimume la duono!), en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj ili ludas neniun rolon.

Por klarigi do terorismon tiaj faktoj absolute ne taŭgas; tro diverĝaj estas la strukturoj de la diversaj grupoj dise en la mondo. Frapa tamen estas alia fakto: Terorismo ekzistas en tre liberalaj kaj en relative malliberalaj landoj, nur tute ne en funkciantaj dikaturoj. Nur, kiun konsekvencon tiri el tia ekkono? Ĉu do enkonduki diktaturon en liberala lando, se tie la terorismo montriĝas longviva? Ĉiukaze, ankaŭ la tezo, ke terorismo estas sekvo de mankanta libereco politika, montriĝas ege pridubinda.
Alia frapa konstato: Precipe aktiva estas terorismo en FR Germanio, Italio kaj Japanio, do iama alianco dum la Dua Mondmilito





*... ĝojis jam kaptitaj teroristoj en Turino, dum aliajn oni serĉis*

kun faŝismaj reĝimoj. Sed singardo necesas ĉe prijuĝo de tia fakto. Eble estas klarigo por certa tipo de terorismo, sed ĝi ne sufiĉas por konstrui teorion pri terorismo ĝenerale. Tia teorio validus nur por social-revoluciaj terorismo-grupoj en altindustriaj ŝtatoj.

### Plej diversaj situacioj

Se oni esploras socian situacion kaj vivnivelon en landoj kun terorismo, oni trovas ĉion: En neevoluintaj landoj de Latin-Ameriko kaŭzoj por estiĝo de terorismo estis malriĉeco kaj socia maljusteco. Certe ĝiajn ŝancojn pligrandigas draste sperteblaj maljusteco kaj nestabileco, kiel en Italio. Sed ekzistas multaj landoj kun multe pli granda maljusteco, multe pli granda mizero, tamen en tiuj regionoj malriĉaj ne ekzistas terorismo. Ĝi burĝonas ŝajne ĉie, en ĉiu medio, en ĉiu socio. Fakte pro ĉi tiu multfaceta strukturo de terorismo-grupoj por sciencistoj estas neeble, doni kompletan kaj konvinkan analizon. Eblas nur montri certajn kondiĉojn, certajn motivojn, certajn kaŭzojn, sed ne ĝeneralajn. Je la demando, ĉu ĉiuj teroristoj estas neŭrozuloj, germana psikologo respondis: „Se ni akceptas, ke ni ĉiuj portas niajn neŭrozojn kun ni, ankaŭ teroristoj estas neŭrozuloj.“ Sed li koncedas, ke temas pri krizo de identeco ĉe gejunuloj: „Iam ili perdis la ŝancon, krei propran identecon; tion ili nun provas perforte.“ Gigantomanie.
Artefarita identeco, krome en rolo de marĝenulo, konstante devas esti apogata. Nelaste el ĉi tiu bezono povas esti klarigata la eksterordinara dependeco de la grupo ĉe teroristoj, ja soifo al la grupo: „Ili senĉese bezonas la konfirmadon de sia ekstrema pozicio per samideanoj. Se ili sukcesas eviti ĉian kontakton kun aliaj personoj, la kunuloj povas verŝajne preskaŭ senaflikte firmteni siajn maniojn respektive grupfanatismon.“ Tiel juĝas alia psikologo kun aludo al la mondvasta denuncado pri la germanaj karceroj, kiujn la teroristoj karakterizis „izoliga torturo“ – kaj ĉiuj simpatiantoj transprenis tuj ĉi tiun nocion.

### Fuĝo en anarkion

Entute estas tri karakterizoj, kiuj indikas damaĝon de la personevoluo (ĉe teroristoj el industriŝtatoj): 1. ĝenita sinteno al la propraj emocioj (ekz. manko de amkapablo, ankaŭ en seksa rilato); 2. difektita rilato al aŭtoritato, ĉu gepatra, ĉu ŝtata; 3. difektiĝo de la identeco persona. Tial por la kriminologo Gustav Nass terorismo estas ĉefe evolupsikologia problemo: „La inklino al anarkismo preskaŭ ĉiam estiĝas dum transiro de malfrua pubereco al plenkreskuleco.“ Lia analizo ne estas eksterordinara: „La juna homo, kiu ankoraŭ ne lernis diferencigi idealon disde realo, kiu ne diferencigas revon kaj fareblaĵon, spertas la diverĝon inter la mondo de l' ideoj respektive ideologioj kaj la reala mondo, de la establita socio, ĝiaj estraj strukturoj kaj ĝiaj neperfektaĵoj, kaj li estas ŝokita. Reago ĉe kelkaj estas fuĝo en anarkion.“ Precipe multtalentitaj junaj homoj spertas kaj ▶

suferas ĉi tiun disecon inter idealisma postulo kaj seniluziiga realo apartforte. La kontingento de la sensemuloj kaj idealistoj en la anarkiaj grupoj estas tre granda.




*Forrabita Schleyer: „kaptito de Ruĝa Arme-Frakcio"*

Tamen, sian intelekton ĉi tiuj junaj homoj nur parte uzas. Nass neas, ke ili kapablas prudente pripensi siajn agojn kaj ties konsekvencojn. Alia psikologino konstatas, ke ili ne uzas „la intelektan kapablon, vidi alternativojn kaj reagi flekseme je diferencaj sociaj kuntekstoj. Anstataŭ fakta pens-operado regas nur kapablo, organize realigi la teknike fareblaĵon kaj transigi al agado, kion oni kredas esti ekkoninta sola vero."

**Porkojn oni mortigas**

Fuĝo el realo en mondon plena de revoj, utopioj, manioj kaj fantazioj do. Ĝin baldaŭ sekvas rigoriĝo kaj stereotipo: Polcistoj ne plu nur estas nomataj „porkoj", sed **estas** porkoj por tiuj anarkistoj. Porkojn oni rajtas mortigi, kaj iam oni faras. El metaforoj estiĝas kruela, sanga realiĝo – ili traktas la kapitalistajn porkojn kaj la policajn bovojn fakte kiel bestojn . . . Per kiuj nociaj vehikloj tiuj „idealistoj" atingas la savan bordon de justiĝo? Kiel ili pravigas aplikon de perforto? Tio eblas nur, se perforto estas neevitebla konsekvenco de batalo de l' bono kontraŭ malbono, de l'bonuloj kontraŭ malbonuloj. Trafe Hermann Lübbe memorigis pri la junulara terorismo de la franca revolucio: Terorismo, laŭ li, estas „praktiko de virto". Li analizas: „La subjektiva kondiĉo de la ebliĝo de terorismo estas la bona konscienco. Nur kun pura konscienco oni eltenas, kio dum realigo de terorismo estas kruda fakteco."

Taŭgan klarigon por tio liveras primitiva militema marksismo, ofte la vaga fono de la socialrevolucia terorismo. Inverse tamen, tute ne estas vere, ke marksisma pensmaniero kondukas al terorismo. Oni vidu nur Francion, kie ekzistas du grandaj partioj, kies ideologio estas marksisma. Tamen en ĉi tiu lando preskaŭ ne ekzistas terorismo (escepte de ekzemple bretona naciisma terorismo). Eble ĝuste ĉar tie la marksismo estas publike elektebla?

Tamen, ĉi tiu primitiva marksismo longan tempon helpis ankaŭ la teroristojn agantajn tutmonde. Gadafi, ŝtatestro de Libio, mem stranga „marksisto", akceptis amike teroristojn, same en Suda Jemeno ili trovis ofte agrablan hejmon. Kaj Idi Amin de Ugando, kiun ne malmultaj mem taksas „teroristo", ankaŭ helpis ilin, kvankam ĉe li supozeble malamo al Israelo ludis la ĉefan rolon (aŭ lia manio, esti la plej supera reganto de la mondo?).

**Rifuĝejoj rariĝas**

Alie en la klasike marksistaj, do la socialismaj landoj. Kvankam oni en certaj rondoj ne nur supozis,






*Tri el tiuj kvar teroristoj, kiuj forrabis germanan aviadilon, estis mortigitaj en Mogadiŝo per speciala brigado GSG 9*




*„Sinjoro Federacia kanceliero! Mi volas denove havi mian patrinon! Mike" Ŝi troviĝis inter la viktimoj de l' Mogadiŝoteroristoj kaj bone revenis hejmen al Mike kaj lia patro*

sed eĉ asertis ke teroristoj estis instruitaj en certaj socialismaj landoj – pruvojn ĝis nun neniu alportis. Eĉ se pro certaj politikaj konstelacioj jen kaj jen registaroj socialismaj simpatiis kun certaj teroristoj, eĉ se PLO-ĉefo Arafat estis bonvena gasto en Moskvo, ne temas pri la ordinara terorismo, pri kiu ĉi tie ni rezonas. Estas sufiĉe facile, karakterizi tian terorismon „milita" kaj tial do – por granda parto de la mondo – legitima.

Sed ju pli ofte ekzemple teroristoj kaptis aviadilojn, des pli ofte ili ne plu trovis landon, kiu permesis al teroristoj surteriĝi. Kaj laste socialismaj landoj eĉ aktive partoprenas la batalon kontraŭ terorismo, ja mem persekutas kaj kaptas teroristojn, kiel montras la ekzemploj de Jugoslavio kaj Bulgario. Mirigis antaŭ kelka tempo, ke eĉ Germana Demokrata Respubliko subtenas la kriminalistojn de Federarcia Germana Respubliko ĉe la persekutado de germanaj teroristoj. Jugoslavio, kiu antaŭe pro siaj bonaj rilatoj al aliaj blokliberaj ŝtatoj toleris arabajn teroristojn, tamen jam en 1976 avertis kaj forkomplimentis la tutmonde serĉatan ĉefteroriston Carlos. Samjare oni la unuan fojon kaptis du germanajn, negravajn teroristojn kaj transdonis ilin al FR Germanio. Kaj ĉijare ŝajne la jugoslaviaj instancoj eĉ aktive kunlaboris kun germanaj, por enkarcerigi pliajn germanajn teroristojn. Ne sufiĉas por klarigi ĉi tiun novan jugoslavian sintenon la deziro de ĉi tiu ŝtato, havigi kvazaŭ rekompence kroatajn ekstremistojn vivantajn en FR Germanio. Ĉar inter Jugoslavio kaj FR Germanio ekzistas formala kontrakto pri reciproka transdono de krimuloj – kaj teroristoj do intertempe ankaŭ por jugoslaviaj instancoj estas krimuloj.

Same, cetere, en preskaŭ ĉiuj aliaj ŝtatoj de la Varsovia Pakto, kun kiuj ne ekzistas kontraktoj kiel kun Jugoslavio. Kaj en Pollando, kaj en Ĉeĥoslovakio, kaj en Germana Demokratia Respubliko policistoj kaj limkontrolistoj uzas oficialajn foto-afiŝojn de la okcident-germana kriminalpolico por trovi germanajn teroristojn.

**Oni multe lernis**

Ĉiukaze, en Eŭropo la kriminalistoj multe lernis dum la lastaj jaroj batalante kontraŭ la skurĝo terorismo. Dank' al internacia kunlaboro eblis almenaŭ kapti ne malmultajn teroristojn. Ke ankoraŭ oni faras multajn erarojn, estas alia ĉapitro de la fenomeno terorismo. Ĉar la intelekta potenco de ĝuste eŭropaj teroristoj ĉiam denove sukcesas venki policajn kaj ŝtatajn barierojn. Ke liberalaj ŝtatoj per terorismo ofte rapide alproksimiĝas al policŝtataj kaj faŝismaj metodoj – jen la plej danĝera sekvo, kiun certe ne celas teroristoj. Nur, kion entute ili celas? La proklamitaj celoj de eŭropaj teroristoj estas nebulaj same kiel ilia ideologio.



*Special-brigado GSG 9: Liberigo laŭ modelo de Entebbe (Ugando)*

La situacio en aliaj kontinentoj estas alia, ĉar la politikaj struktu- ▶

roj estas aliaj. Ekzemple en Argentino, kiu pro la ĵus okazinta futbal-ĉampioneco estis pli bone observita de la tutmonda publiko, terorismaj aktivecoj maloftiĝis kompara al antaŭaj jaroj. Tie tamen oni solvis la problemon alie: Teroron de revoluciuloj la ŝtato respondis per kontraŭterore. La listoj de malaperintaj homoj estas longa, kaj neniu povas diri, kiu terorisma flanko kaptis kaj eble mortigis ilin.

**Maltaŭgaj rimedoj**

Certe terorismo mondvasta ankoraŭ dum multaj jaroj aŭ eĉ jardekoj manifestiĝos ĉiam denove.



*„Erare“ mortpafita per policistoj dum ekzameno de suspekta loĝejo: senkulpa skoto Iain MacLeod*

Ke ĝis nun preskaŭ ne eblis kunordigi la internacian batalon kontraŭ terorismo, certe estas unu el la plej malĝojigaj ĉapitroj de l' terorismo. Kiam FR Germanio proponis al UN-asembleo verdikton pri aviadilterorismo (kun la necesaj konsekvencoj de rigora persekutado de teroristoj aeraj), oni multe diskutadis, sed senrezulte.

Bone prilumas la dilemon, kion la usona registaro proponis: eksport-bojkoto kontraŭ tiuj ŝtatoj, kiuj subtenas la internacian terorismon. Oni blokis la liveradon de kamionoj, aviadiloj kaj alia materialo kun valoro de 400 milionoj dolaroj al Libio kaj haltigis la vendadon de aviadiloj al la Popoldemokratia Respubliko Jemeno.



*Frato de policisto murdita dum forrabo de Aldo Moro (en la ĉerko) kolapsas dum funebra ceremonio en Romo*

Samtempe oni diskutis, ĉu sur la bojkot-listo aperu ankaŭ Irako kaj Alĝerio. Sed tuj leviĝis protestoj kontraŭ la intenco de la registaro: Senatanoj el la koncernitaj federaciaj ŝtatoj, kie oni produktas la haltigitajn varojn, avertis ke tie perdiĝas centoj da laborlokoj. Kaj la komerca ministerio avertis, ke tia bojkoto damaĝus la usonan eksporton ĝenerale.

Terorismo savas laborlokojn – pli absurda priskribo de l' fenomeno mondvasta terorismo preskaŭ ne estas imagebla . . .

## Sen perforto kontraŭ terorismo?

Wolfgang Salewski, konsilanto de la registaro de FR Germanio en teroristaj aferoj, en ĵus aperinta libro kritikas la decidojn pri liberigo de 85 pasaĝeroj en aviadilo sur la flughaveno de Mogadiŝo (Somalio) dum oktobro 1977. Tiam kvar teroristoj estis mortigitaj.

Psikologo Salewski, kiu mem ĉeestis la liberigon, diras ke tiu ago estis plej bona indico, „ke ni troviĝas jam meze en diabla cirklo de teroro kaj kontraŭteroro“. Li avertas, ne rigardi la agon en Mogadiŝo ĝenerale valida modelo: „La konkero de la aviadilo ja alportis liberecon por la kaptitoj kaj tial estis salutinda kiel solvo de speciala kazo, sed en la tuta scenejo de l' terorismo ĉiu ago de kontraŭperforto nur kondukas al pliaj perfortaj agoj.“ Post la eventoj en Mogadiŝo sekvis timo pro venĝo. Fakte teroristoj respondis ekzemple per eksplodigo de aviadilo proksime de Singapuro, kie mortis 98 homoj, respondis per forrabo de Palmers en Vieno, de Aldo Moro en Romo. „La problemo de nova perforto ne estas solvita,“ konstatas Salewski, kaj daŭrigas: „La kazo Mogadiŝo certe ne konvertos perfortulojn kaj simpatiantojn, sed por ili estas ekzemplo de perfido per intertraktantoj.“

Tial li supozas, ke la brutaleco de teroristoj estos ankoraŭ „pli senkompata, pli senutila, pli blinda“. Li proponas senperfortan vojon: „Solvo senperforta ne signifas kapitulaci antaŭ perforto. Ni devas vidi en teroristoj – kiom ajn malfacile estas – homojn, kiuj staras ekster niaj sociaj normoj kaj estis kondukitaj per malĝusta, ofte ne proprakulpa, evoluo en sakstraton de perforto.“

# Afriko perturbata

Kio nun okazas en Afriko, certe ne estas kialo por resti trankvila aŭ eĉ ĝoji kaj serenumi. Tamen, ĉu eŭropano entute povas rezoni pri la eventoj sur la nigra kontinento? Aŭ ĉu per komentoj pri tio oni glitas jam en la danĝeran zonon de interveno ĉe internaj aferoj?

Mi opinias, ke kompreneble ankaŭ eŭropanoj – kaj ne nur iliaj registaroj kaj ĉefpolitikistoj – povas kaj devas okupiĝi pri evoluado en Afriko, ja tre najbara kontinento. Ne eble tial, ke ni eŭropanoj scius treege multe pri la vera situacio sur tiu kontinento, scius kaj konus vere afrikajn sintenojn, motivojn, karakterojn kaj animojn, sentojn kaj dezirojn. Fakte ni ne aŭ tre malbone konas ĉi ĉion, ĉar dum jarcentoj ni kiel koloniismaj popoloj neeviteble havis malĝustan vidpunkton pri la afrikaj homoj. Dum terure longa periodo ni ĉefe vidis sklavojn, se ni rezonis pri negroj, vidis malamikajn islamanojn, se ni pensis pri araboj.

Aliflanke tamen neniu povas pretervidi, ke Afriko ludas gravan rolon por eŭropanoj. Hodiaŭ ni jam grandparte dependas de ĉi tiu kontinento. Ni pensu nur pri nafto kaj aliaj krudaj materialoj. Sed ni ankaŭ pensu, ke neniel povas resti sen influo al aliaj popoloj kaj kontinentoj, se ie en la mondo regas militado, ekestas kaj restas konfliktoj, lamas progreso ĝuste pro tiaj perturboj. La hodiaŭa absoluta interplektiteco de l' tuta mondo ne povas lasi nin netuŝita laŭ sen-mistarpunkto: Ili vidu mem, kiel ili solvos siajn problemojn!

Se tiel pensas eŭropano kaj aroge kritikaĉas tiujn „sovaĝulojn" afrikajn, li forgesas pri la propra, eŭropa historio. Por arogi, Eŭropo tute ne havas kialon. Se hodiaŭ en Afriko batalas klanoj kontraŭ aliaj klanoj, triboj kontraŭ triboj, ideologioj kontraŭ aliaj ideologioj, tion oni certe povas kaj devas bedaŭri. Sed ĉu ne same evoluis Eŭropo antaŭ nur malmultaj jarcentoj? Cu estis pli bona batalo tribo kontraŭ tribo, popolo kontraŭ popolo, reĝo kontraŭ reĝo – nur ĉar estis eŭropaj triboj, popoloj, reĝoj? Kaj ĉu la sama interplektiĝo de interesoj ekonomiaj, hegemoniaj, kulturaj kaj ideologiaj ne estis karakteriza ekzemple por la Tridekjara Milito en Eŭropo? Demandu eŭropan lernanton, kial li ne ŝatas la lecionojn historiajn: „Oni ja nur devas lerni pri militoj!"

Kaj se oni hodiaŭ kun abomeno parolas pri la reciprokaj masakroj en Arfiko: Ĉu la masakroj dum eŭropaj revolucioj estis pli bonaj? Ĉu Idi Amin aŭ Hitler estas la pli bona diktatoro?

Eĉ ne pri demokratio, kiu hodiaŭ regas en preskaŭ tuta Eŭropo, la eŭropanojn fieru! Ĝis antaŭ malmultaj jaroj diktatoroj regis en la koro de Eŭropo, nome en Portugalio, Hispanio kaj Grekio. Ne la helenoj inventis vere demokration, ĉar ilia reĝimo privilegiis nobelulojn kaj eblis nur sur fundamento sklaveca! La plej grandan hodiaŭan demokration kreis jes eŭropdevenaj homoj en Norda Ameriko. Sed tiuj homoj estis forpelitaj el Eŭropo pro ekonomia, religia aŭ ideologia diskriminacio!

Certe, Eŭropo dum pluraj jardekoj ne plu suferis militon. Sed ĉu antaŭe ne estis eŭropanoj, ĉefe germanoj, do sufiĉe kleriĝinta popolo, kiu kaŭzis la plej teruran kaj katastrofan militon de l' tuta homa historio?

Se Organizo de Afrika Unuiĝo (OAU) luktadas pri la ĝusta vojo de Afriko al paco, prospero kaj unuanimeco, ne helpas atentigi pri la diseco ideologia por aserti: Jen, la afrikanoj ne povas mem solvi siajn problemojn. Tiuj problemoj, cetere, ja tre ofte radikas en iama koloniismo. Kiu ekzemple diktis tiujn ofte netaŭgajn limojn de afrikaj ŝtatoj? (Ankaŭ en tio ni havas paralelojn en la eŭropa historio!) Kiu dum jarcentoj malhelpis kleriĝon de la popolamasoj afrikaj?

OAU dum sia lasta konferenco ĵus finita montriĝis splitita. Tre diverĝaj interesoj regas la diversajn ŝtatestrojn. Ankaŭ la komuna batalo kontraŭ rasdiskriminacio ne plu sufiĉas por firme kunteni ilin. Kaj Kurt Waldheim, Ĝenerala Sekretario de UN, atentigis pri alia grava nesolvita problemo: milionoj da rifuĝintoj.

Kiel ĉiam, ankaŭ en la afrikaj krizoj ĉefe suferas la popolamasoj. Oni nur pensu, ke la akridan plagon oni tial ne povas forigi, ĉar en la koncernitaj regionoj regas militoj. Homoj tie mortas aŭ per kugloj aŭ pro malsato – ne tre agrabla alternativo.

Por konduki la afrikan kontinenton el la krizo, necesas streĉoj tutmondaj. Ekzemple helpos ĝin pli justa monda ekonomia sistemo, unu el la ĉefaj celoj de UN. Necesas reorganizo kaj plibonigo de OAU mem. Kaj necesas helpo per aliaj ŝtatoj, ankaŭ eŭropaj – tamen ili helpu nur, se Afriko mem vokas ilin.

# La unua medalo estas aĉetabla

Por la unua fojo en la historio nun ekzistas 100-rubla ormonero. Sovetunio ĵus eldonis ĝin omaĝe al la Olimpiaj Ludoj 1980 en Moskvo kaj Talino; strikte limigita eldonkvanto: 130.000, do vera raraĵo por numismatoj! Ĝi montras la ŝtatblazonon, dorsflanke la




emblemon de la Ludoj kaj la Lenin-stadionon en Moskvo, kie okazos plimulto de l' sportaj konkuroj.
Mono kompreneble ĉiam ludas gravan rolon ĉe Olimpiaj Ludoj, kiuj por la koncerna urbo resp. lando ja ne estas malmultekostaj. En Moskvo oni devos elspezi proksimume 800 milionojn da rubloj, sen kalkuli apudajn kostojn kaŭzotajn per konstruado de hoteloj, plivastigo de la subtrama reto k.s.
Kiel ĉe antaŭaj Ludoj, ankaŭ en Moskvo oni kompreneble ne povas fari ĉion mem: Internacieco demonstriĝas jam ĉe preparoj. Multaj okcidentaj firmaoj jam fervore laboras en Sovetunio: okcident-germana firmao konstruas novan flughavenon sub asistado de francaj specialistoj. Ekzemplo de „paca kunekzistado kaj sukcesa ekonomia kunlaboro," kiel oni akcentas en Moskvo.
La sovetaj organizantoj aparte studis la tiaman germanan organizadon: „Por la aranĝantoj de la 22aj Olimpiaj Ludoj en Moskvo 1980 precipe valoraj estas la spertoj de la Olimpiaj Ludoj en Munkeno 1972, kiuj laŭ opinio de multaj fakuloj distingiĝis per altkvalita organizado kaj altnivela tekniko," skribas la revuo de la soveta ambasadejo en FR Germanio – kaj ne temas nur pri ĝentileco. Jam en 1975 oni faris kontrakton pri interŝanĝo de spertoj kaj nun intense aktivas koncerna laborgrupo.
Allogaĵo por multaj internaciaj firmaoj ankaŭ estas, ke ili rajtas sin nomi „oficiala liveranto de l' 22aj Olimpiaj Ludoj 1980 en Moskvo", se ili donacas produktaĵojn aŭ disponigas servojn.
Sergej Nikitin, estro de l' turisma administrado en Moskvo, priskribas siajn klopodojn: „Por la Olimpiaj Ludoj 1980 ni atendas centmilojn da eksterlandaj turistoj. Al la preparoj por ĉi tiu evento apartenas ne nur la konstruado de hoteloj, moteloj, restoracioj kaj kafejoj, sed ankaŭ instalo de aparta trafik-reto, bona organizado de servoj kaj de medicina prizorgado, oferto de ampleksa programo de ekskursoj kaj kultur-aranĝoj, trejnado de l' necesa personaro, produktado de memoraĵoj kaj multaj aliaj aferoj."
Ne nur la registaro, sed la tuta soveta popolaro estas fiera, ke por la unuan fojon en Moskvo okazos Olimpiaj Ludoj. Jam pro ĉi tiu fiero oni povas esti certa, ke tiuj Ludoj estos granda sukceso. S.H.

---

*Ignati Novikov, prezidanto de la Organiza Komitato por la Olimpiaj Ludoj 1980 kaj vicprezidanto de l' minstra konsilantaro de Sovetunio, respondas al SEMAJNO pri la preparoj en Sovetunio i.a.:*

La projektado de l'novaj objektoj pli-malpli estas finita, ĉe konstruado kaj rekonstruado de olimpiaj objektoj jam estas faritaj tre ampleksaj laboroj. Entute estas 99 objektoj, 76 el ili en Moskvo. Rimarkinda specialaĵo: Post la Ludoj ili ĉiuj estos uzataj utile.
Ni prenu ekzemple la olimpian vilaĝon, kiu akceptos pli ol 12.000 sportistojn. Ili disponos pri 18 domoj kun po 16 etaĝoj de nova konstruserio. Proksime estiĝas kulturcentro kun teatro kaj koncertejo, sportamplekso, restoracio, pliaj gastejoj kaj magazeno, do ĉio necesa. Laŭ opinio de Lord Kilanin, prezidanto de l' Internacia Olimpia Komitato, nia olimpia vilaĝo estos la plej bona en la historio. Post la Ludoj miloj da Moskvanoj ekloĝos en ĉi tiu kvartalo.

Ni estas plene konvinkitaj, ke la olimpiaj objektoj estas moderne konstruataj kaj ke la kvalito de la laboro estos alta. Multaj objektoj estos pretaj jam en 1979 kaj disponiĝos al la partoprenantoj de l' 7a Somersportakiado de l' popoloj de Sovetunio. Al la finkonkuroj estos invitataj 2.000 eksterlandaj sportistoj.

Dum la Olimpiaj Ludoj en Moskvo kaj Talino estos akceptataj samtempe ĉ. 240.000 partoprenantoj kaj gastoj. Kompreneble ĉio anticipe estas pripensita, por doni al ĉiuj plenajn komforton kaj servadon. Ankaŭ la bezono de trafikiloj estas kalkulita: Pli ol 6.000 aŭtobusoj kaj 3.500 aŭtomobiloj estos je kroma dispono.
Ni klopodas ĉiamaniere atingi, ke la Olimpiaj Ludoj en Moskvo estos la plej reprezentaj en la historio kaj ke tiuj Ludoj plenmezure esprimos la humanajn olimpiajn idealojn.

La Moskvanoj kaj la tuta soveta popolo deziras, ke la Olimpiaj Ludoj 1980 estos rimarkinda mondvasta sportfesto.

# HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 58 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj pri la monvado en la tuta mondo
- Kulturaj paĝoj pri literaturo, arkeologio, ŝako k.s.
- Duoblaj „kalendara“ kaj „kongresa“ numeroj
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literaturaj aŭ sciencaj suplementoj
- Konstantaj rubrikoj: De lando al lando, Instruado, Heroldo de la Junularo, Feriaj Renkontiĝoj, Infana Anguleto, foto-rubriko "Nia Filmo", k.a.

Jarabono: 400 bfr. aŭ egalvaloro

Provekzemplero ricevebla ĉe la redakcio:

Rue de la Reinette 13/b.28, B-1000 Bruselo, Belgio
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

## PAĜO DE JUNULARO

# Naŭ lingvojn lerni?

„Europa Komunaĵo akcelas fremdlingvan instruadon", tiajn aŭ aliajn titolojn oni legis en junio super pli aŭ malpli grandaj artikoloj. Oni antaŭvidas subtenon por instruistoj, lernantoj kaj aliaj profesiaj grupoj argumentante, ke pro la verŝajna akcepto en la venontaj tri jaroj de Grekio, Portugalio kaj Hispanio la Eŭropa Komunaĵo (EK) disponos pri naŭ oficialaj lingvoj egalrajtaj: la angla,

### TEMO DISKUTINDA

dana, franca, germana, greka, hispana, itala, nederlanda, portugala (senkonsidere al la irlanda, kiu ja ankaŭ ludas certan rolon). Ekzistas naŭpunkta plano, kies efektivigo kostos en la unua jaro 16,84 milionojn da germanaj markoj kaj poste en ĉiu jaro ĝis 1982 21,43 milionojn da gmk. Kiom kostos la plivastigo por la kurantaj servoj je tri lingvoj, tion oni ne antaŭtaksas. Sufiĉe grava kunlaboranto de la informa servo de EK diris al mi ĝuste en tiu periodo, ke venos granda preskaŭ nevenkebla dilemo – se ne: kaj li referis al laŭ ĝenerala opinio utopia solvo. Kio estas nova en tiu projekto? Fremdlingvaj instruistoj studu parton de la studotempo en la lando de ilia studolingvo. Nenio nova: antaŭ tridek jaroj ni jam spertis eĉ pli bonan sistemon en nia malgranda lando. Bedaŭrinde oni ne diras, en kiu lando oni faras tion por kiuj lingvoj – ĉu por du, tri aŭ eĉ por la naŭ lingvoj.
Ankaŭ la lernantojn oni intencas helpi por egaligi financajn kaj geografiajn malavantaĝojn. Por lernantoj de la plej superaj klasoj de gimnazioj oni aranĝos feriestadojn kun nur unu oficiala lingvo.
Estas facile vidi, ke per ĉiuj tiuj rimedoj la pozicioj de la jam fortaj instrulingvoj, por kiuj speciale en la landoj de malfortaj lingvoj oni elspezas altajn sumojn, fariĝas ankoraŭ pli fortaj.
Nova estas la esploro pri enkonduko de dua lingvo en la bazan instruadon, pri lingvoinstruado por lernantoj inter la 16-a kaj la 25-a vivojaroj en profesiaj lernejoj kaj universitatoj en kombino kun aliaj fakoj, kaj la zorgoj, kiujn oni havas pri gejunuloj, kiuj forlasas lernejojn sen iuj ajn fremdlingvaj konoj, kaj ankaŭ pri infanoj, kiuj ne bone adaptiĝas al lingvolernado. La Komisiono proponas reton de lernejoj, kiuj evoluigu specifan eŭropan identecon paralele al la laboro de la jam ekzistantaj eŭropaj lernejoj. Kiel celgrupojn de profesiorientita lingvoinstruado oni antaŭvidas kuracistojn, flegistinojn kaj arkitektojn – certe tre gravajn grupojn.
Ekster la jam prezentitaj duboj mi nek trovas mencion de modernaj instrumetodoj kaj instruhelpiloj, kies evoluon oni povus grandskale esplori kaj ĝeneraligi, nek veran paŝon antaŭen en la egalrajta traktado de la konoj de kiel eble plej multaj personoj en la diversaj oficialaj lingvoj.
Kiel sobraj ŝajnas al mi kontraŭe eldiroj de konata fakulo pri latinidaj lingvoj, Harald Weinrich, kiu farante porokazan prelegon pri la temo „La senlingva amikeco" aŭ „Ĉu ni malhavos la francan lingvon?" montras, ke malgraŭ la germana-franca kontrakto, speciale pro diversaj manipuladoj ĝuste en la superaj klasoj de gimnazioj oni preskaŭ ne plu lernas la francan lingvon, eĉ ne en Federacia Respubliko Germanio, por ne paroli pri aliaj lingvoj. En tempo, kiam pli kaj pli interplektiĝas ne nur la eŭropaj popoloj, kiam ne nur pro pli oftaj homaj renkontiĝoj, sed speciale en ekonomio, industrio kaj scienco pli grandaj multdirektaj lingvokapabloj estas bezonataj, oni vere povus pli profunde studi la problemon kaj ne prezenti ekstere eble utilajn, sed interne tre danĝerajn partajn solvojn. G. B.

# De protesto al varo

Bob Dylan, usona pop-poeto, „megafono de l' malkontenta junularo de l' tuta mondo" (laŭ brita publicisto), iam vera protestkantisto kaj stelo grandioza, ankoraŭ hodiaŭ scias trafi per teksto kaj sono la emociojn de la juna generacio: Ofendita de gepatroj kaj socio, malkontenta pri medio, en kiu kvazaŭ kontraŭvole oni naskiĝis. La malfru-kapitalistaj devigoj unuflanke kaj la eskapo per drogoj aliflanke estis liaj temoj, modaj, certe, tamen ofte trafaj, almenaŭ por la oreloj de juna, seniluzia generacio.
Dume la konraŭstelo ne nur mem fariĝis riĉa stelo de la popĉielo, sed ankaŭ establiĝis mem en de li konraŭbatalita revu-muziko, konsum-muziko – de protesto li venis al varo. Iam li batalis kontraŭ la usona brilo kaj la „ridet-fivizaĝoj" (Dylan) nun li – dum sia lasta eŭropa turneo – lasis sin akompani per tri ridetantaj vaŭ-vaŭ-kantistinoj kaj seskapa, plensona rokorkestro. En siaj tekstoj li restas vaga, kelkfoje kantas melankolie, sed tiun tristecon la tri knabinoj per siaj voĉetoj kuŝigas milde sur daŭnoj – aŭ la orkestro akrigas ĝin patose. Bob Dylan aperas jam preskaŭ sia propra legendo.

## KONKURSO

**Situacio kaj perspektivo de l' junularo de mia lando**

Jen vi povas skribi pri viaj zorgoj, ĝojoj, planoj, ideoj, idealoj, problemoj kaj tiuj de viaj samaĝuloj. Kriterioj por la prijuĝo estos, ke sufiĉe plaste kaj klare leganto en tute aliaj medio kaj kontinento povas kompreni vian situacion. Kompreneble ankaŭ stilo, lingva korekteco kaj skribmaniero estos juĝataj.
Partopreni rajtas ĉiu en la aĝo de 12 ĝis 20 jaroj; ne forgesu indiki viajn aĝon kaj adreson (en klara skribo!). Limdato estas la 30a de januaro 1979 (dato de la poŝtstampo). Sendu vian manuskripton sub la rubriko „junulara konkurso" al SEMAJNO, S. Maul, Singerstraße 1/III, D–8900 Augsburg, FR Germanio.
Premioj: 1-a premio 500,– gmk. 2-a premio: 200,– gmk. 3-a premio: 100,– gmk. Krome multaj valoraj libroj, sondiskoj ks. La plej bonaj verketoj estos publikigataj. Multan plezuron ĉe verkado kaj bonan sukceson deziras via SEMAJNO.

# Hispanio: poprastila demokratio?

Perfidon riproĉas la ekstrema dekstro de Nacia Alianco (ĉirkaŭ Blas Piñar, José Antonio Girón, la ĵurnalo „Alcázar", la revuo „Fuerza Nueva" kaj aliaj) al la reĝo Juan Carlos I kaj ties ĉefministro Adolfo Suárez. Fakte la akuzitoj estis ĵurintaj, dum regis la diktatoro Francisco Franco, fidelecon al la principoj de la Nacia Movado (posteulo de la Falango), kiuj radikale kontraŭas pluralisman sociordon kaj ties plej okulfrapan esprimilon, la politikajn partiojn. Ĉu ne estas iom timige ke la disĉiploj de faŝismeca diktatoro mallonge post la morto de la majstro ekdirektas la ŝipon en demokration?

La referendumo de decembro 1976 kaj la parlamentaj balotoj de junio 1977 ja liveris certagradan legitimecon al la nova direkto. Tamen, necesas demandi tre insiste, ĉu tiuj popolaj voloesprimoj kovras ankaŭ la konkludojn: ke pluoficu homoj el la frankismo apogante sin sur la sama polico de la diktatoro. La pafmortigo de du junaj ekstrem-maldekstraj manifestantoj, komence de julio, en Pamplona kaj San Sebastián fare de la griz-uniforma polico kaj la barbareco de invado, detruo, rabado kaj ekskrementado fare de tiu sama polico en la jam trankviliĝinta urbo Renteria prave dubigas la politike konsciajn civitanojn pri la legitimeco de la nuna registaro. Rodolfo Martin Villa, ministro pri internaj aferoj kaj tiel ĉefo de la polico, televide nomis tiujn okazintaĵojn simple eraroj (sen kia ajn esprimo de bedaŭro!) kaj la agojn de la – precipe vaskaj – aktivistoj (kiuj, jes ja, mortigis plurajn policistojn kaj aliajn homojn) krimoj, ŝovante la kulpon al ĉi-lastaj kaj al la tuta historio.

En intervjuo donita fine de julio al SEMAJNO, Juan Maria Bandrés Molet, la sola senatano de la Maldekstro de Eŭskadio kaj kompetentulo pri transportoj en la Vaska Ĝenerala Konsilio, substrekis kiel ĉefajn problemojn de la hodiaŭa Hispanio jenajn punktojn:

● La EKONOMIA KRIZO, kaŭzita precipe eksterlande kaj portinta al Hispanio pli ol 1.000.000 da registritaj senlaboruloj, aparte de la remizeriĝo de multegaj familioj, pliakrigas la politikajn problemojn, kiuj estus malpli malfacile solveblaj en sanaj ekonomiaj cirkonstancoj.

● La STABILIGO DE LA DEMOKRATIO estas ne garantiita, malgraŭ la certasenca reformemo de la registaro, ĉar ne ekzistas aŭtentike demokrataj instrumentoj.

● La DIVERSAJ ETNOJ de la hispana ŝtato, ĉefe vaskoj kaj katalunoj, postulas la aplikadon de fundamenta regulo de demokratio: la memdeterminadon. Necesas aŭtentika aŭtonomeco kun ĉiuj tri branĉoj de la ŝtatpovo (parlamento, registaro kaj justico), kion la nun diskutata konstitucí-projekto neas al la regionoj.

Tiuj ĉi elementoj indikas sufiĉe klare la vojon irotan de la „nova" Hispanio. Nenio serioza okazas por partoprenigi la laboristojn en la gvidado de entreprenoj, kaj



*J. M. Bandrés Molet*

dum oni plialtigas salajrojn kaj plihumanigas la socialajn cirkonstancojn, la inflacio de 15 – 20 % kompensas preskaŭ ĉiujn gajnojn. La kapitalismo ŝajnas savita, eĉ pli vivkapabla sub ne-diktatora reĝimo.

La parlamento havas eŭropecan aspekton: du ĉambroj (Kongreso de Deputitoj kaj Senato). Sed la ŝajno trompas, ĉar ambaŭ ĉambroj havas saman balot-distrikton, la provincon, kaj la Senato estas la malo de demokratia spegulaĵo de la politika volo de la popolo, ĉar ĉiu provinco delegas la saman nombron da senatanoj (kun sensignifaj esceptoj de la insularoj): 4 senatanoj reprezentas la 102.000 enloĝantojn de la provinco de Soria (la plej malmulte loĝata), kaj same 4 reprezentas la 4.500.000 de Barcelona (la plej multe loĝata)! Fine, estas tre eŭropece ke la civitanoj ne havos la elementan rajton memdetermini la apartenon de certa regiono al la ŝtato, decidi pri la demando, ĉu Hispanio estos respubliko aŭ monarkio, ĉu la ŝtato estu centrisma aŭ federaciisma, ktp. ktp. Ĉiujn ĉi misojn kamuflos la referendumo, en kiu eblos nur „jes" aŭ „ne" aŭ „sindeteno".

Jes ja, Valery Giscard d'Estaing pravis substrekante, ĉijunie en Madrido, ke Hispanio estas parto de Eŭropo: Feliĉe la duoninsula ĉefŝtato ne plu iras sian vojon de diktaturo, sed bedaŭrinde ĝi ŝajnas scii nur imiti la „sukcesan" modelon de okcidenta Eŭropo kaj Usono, sen serĉi progreson kompare al tiuj ĉi. U.J.M.

**LEKSIKONO**
**Konvencio de Lome**

Post 18monata intertraktado en februaro 1975 Eŭropa Komunumo (EK) kaj 46 ŝtatoj el afrika, karibia kaj pacifika regionoj (AKP-ŝtatoj) subskribis en la ĉefurbo de Togo la „Konvencion de Lome". Aliĝis poste pliaj sep evolulandoj. La unua konvencio finos en 1980. Tial jam nun komenciĝis intertraktado pri dua konvencio. Plej grava punkto estas stabiligo de l' gajno. Se evolulando de ĉi tiu grupo per eksportado al EK – ekzistas listo de 29 produktaĵoj – havas malgajnon, ĝi estas kompensata el fondaĵo (disponiĝas naŭ miliardoj da gmk ĝis 1980). Aliaj avantaĝoj por la evolulandoj, ĉefe iamaj eŭropaj kolonioj, estas libera aliro por certaj produktaĵoj al EK-merkato kaj fondaĵo por evoluigo de industria kunlaboro. La AKP-ŝtatoj nun postulas plivastigon de l' preferoj ĉe krudaj materialoj kiel kupro kaj fosfato kaj pli grandan helpon ĉe agrikultura evoluigo. EK aliflanke deziras garantiojn por privataj investoj kaj la homaj rajtoj.

# La arto, fariĝi 134jara

**Gerontologio, la juna scienco de maljuniĝo, estas ankoraŭ ne tre populara. Kvankam la ekkonoj pri la procezoj kaj necesoj de la „tria aĝo" jam estas multaj kaj variaj, nur hezite oni ankaŭ tiras la konsekvencojn por la praktika vivo.**

Pioniroj de gerontologio intertempe mortis, sen fariĝi 150jaraj, sed la epigonoj jen kaj jen promesas aŭ eĉ prognozas, ke homoj povas atingi ĉi tiun altan aĝon – sen demandi, ĉu iuj homoj ankaŭ volas metuzameliĝi. Tiun demandon tamen faris germanaj demoskopoj antaŭ kelkaj semajnoj al 2.000 personoj pli ol 16jaraj en FR Germanio: „Se la scienco ebligus fariĝi 150jara kaj ankaŭ ĝis tiu aĝo teni siajn fortojn: Ĉu vi volus vivi tiel longan tempon aŭ ne?" 46 procentoj de la demanditoj jesis, 27 procentoj neis kaj 27 procentoj silentis. Verŝajne ili estis la pli prudentaj, ĉar efektive ĉi tia demando estas – milde dirite – absurda.

Tamen interesa estas la rezulto de la demoskopia pridemando, se oni komparas la respondojn dum diversaj jaroj. Ĉar la saman demandon la demoskopoj ĉiam denove metis antaŭ la homojn. Kaj montriĝis evoluo: Dum junaj homoj hodiaŭ montras malpli deziron fariĝi maljunega ol antaŭ 22 jaroj, estas inverse ĉe la maljunuloj. Kreskanta nombro de ili ŝatas vivi laŭeble longan tempon.

Jen certe ankaŭ efiko de la medicina progreso. Ĉar kompreneble estas fakto, ke nuntempe pli multaj homoj en altevoluintaj landoj fariĝas altaĝaj: 80, 90 ja 100 jaroj ne plu estas raraĵoj. Tamen, la mezgrada vivodaŭro ekzemple en FR Germanio dum kelkaj jaroj denove malaltiĝas – sekvo de trafikakcidentoj same kiel de malsaniga vivmaniero. Kancero, kormalsanoj, trodikeco kun koncernaj sekvoj por la sanstato estas la ĉefaj faktoroj.

Sed ke eblas fariĝi pli ol centjara, ĉu tion ne konstante pruvas la informoj pri homoj en Kaŭkazio kaj Ekvadoro? 30oblaj avoj tie atingas aĝojn de preskaŭ 150 jaroj – se oni kredas la informojn donitajn de tiuj avoj. Multaj antropologoj kaj medicinistoj ĉiam pridubis ilin. Aliaj trovis ne nur la informojn ĝustaj, sed ankaŭ la por tio necesajn klarigojn. Do brita antropologo skribis tre sciencaman libron pri la loĝantoj de la ekvadora vilaĝo Vilkambambo, kie 1971 oficialaj instancoj nombris inter 819 vilaĝanoj naŭ personojn pli ol 100-jarajn. La brita sciencisto priskribis ilin kaj la kaŭzojn de ilia longvivo: bona aero, prudenta nutrado, kruda sed pura laboro sen streĉo, nedifektitaj familioj ktp. Kaj doktoro Salvadoro de la ministerio por sanaferoj de Ekvadoro fiksis la medicinan kaŭzon: La vilaĝanoj preskaŭ neniam havas sangcirkulajn malsanojn, li fanfaronis.



*Grandaj firmaoj per kursoj preparas siajn dungitojn por la tempo post la profesia laboro. Oni devas ĝustatempe lerni, kiel vivi dum la fazo de l' tielnomata tria aĝo.*

**Rapida maljuniĝo**

Sed jen Aleksandro Leaf, medicinprofesoro de Harvardo, havis la ideon esplorferii en la tri plej konataj lokoj de longa vivo, do en Kaŭkazio, la Karakoram-montaroj de Kaŝmiro kaj en Vilkabambo. Lia celo estis trovi komunan kaŭzon por la alta aĝo de ĉiuj maljunuloj. Li ne trovis. Sed li rimarkis kun medicina spertvido, ke grizuloj kun 130 jaroj ofte havis frape bonajn arteriojn. Kaj li rimarkis ion alian frapan: Dum sia unua vizito li ekkonis 122jaran viron. Tri jarojn poste li renkontis la saman viron, nun jam 134jaran. Ŝajnis al la medicinprofesoro, ke tiu homo tro rapide maljuniĝas.

Por trovi la veran kialon, malgranda teamo, inter ili antropologino, esploris la strangan fenomenon. Rezulto: La homoj en la mondfama vilaĝo de Anden-montaro ŝparas nomojn: la filo portas la saman nomon kiel la patro kaj la avo. Kaj ĉar longa vivo estas simbolo de impona stato, oni de jaro al jaro ĉiam aldonis kelkajn jaretojn al la vera jarnombro – ĝis oni havis la jarojn de patro aŭ patrino. Kaj ĉi tiun naskiĝdaton ja ĉiu povas oficiale konfirmi per dokumentoj. La antropologino tamen trovis la artifikon; ŝi demandis la nomojn de la baptogepatroj kaj kontrolis la ekleziajn dokumentojn. Kaj jen: Viro, kiu indikis esti 127jara, fakte ĝisvivis nur 92, kaj maljunulino, kiu volis esti 96jara, efektive estis nur 81jara, ktp.

Komentas Leaf: „Se vi demandas min – estas same en Kaŭkazio kaj ĉiuj aliaj regionoj kun tielnomataj metuzalemoj."

Sendepende de ĉi tiuj amuzaj maljuniĝoj, tamen la scienco ankoraŭ ne precize scias, kiel kaj kial la homo maljuniĝas. Sed ke iuj homoj fariĝas pli maljunaj kaj aliaj ne, por tio sciencistoj trovis klarajn pruvojn. Sen priskribi la komplikajn procezojn en la homa organismo, oni tre simple, tamen ĝuste, povas diri: Kiu volas fariĝi centjara, tiu serĉu por si gepatrojn, kiuj fariĝas centjaraj! Alivorte: La aĝon grandparte destinas la genkodo de la homo, ne eksteraj influoj aŭ medikamentoj. Se la genkodo estas en ordo kaj oni vivas prudente, atingi cent kaj pli jarojn estas eble. La ordinaran limon entute tamen la scienco metas je 120 jaroj.



Modera sporto estas grava ankaŭ pro maljunuloj

Kompreneble profesoroj en la tuta mondo daŭre esploras la eblecojn, plilongigi la homan vivon. Sed ĉu estas pli dezirinde, ekstreme plilongigi la vivon de kelkaj homoj, aŭ plilongigi la ĝeneralajn homvivojn je kelkaj jaroj? Gerontologio ja ne estas nur geriatrio, sed ankaŭ sociologio, psikologio kaj antropologio koncerne maljunajn homojn. Kion helpas, se homoj estas maljunaj, sed ekzemple laŭ lastaj eltrovoj 700.000 britaj maljunuloj riskas ĉiujare morti pro malvarmo, ĉar la domoj estas nesufiĉe aŭ tute ne hejtitaj? Kaj kion helpas maljuniĝi, se post pensiiĝo multai maljunuloj malsaniĝas pro enuo? Ili ne ĝustatempe serĉis kaj planis agadon por la postlabora fazo de sia vivo, havas nek hobion nek aliajn okupon aŭ taskon. (Tio, cetere, apenaŭ validas por esperantistoj . . .)


Kutime en industriaj ŝtatoj post la eksprofesiiĝo sekvas perdo de kontaktoj kaj iom post iom socia kaj sociala izoliĝo, des pli draste se mortas unu de la geedzoj. Gerontologoj tial jam delonge postulas en tiuj ŝtatoj efikan preparon por la „tria aĝo". Sed la registaroj kutime opinias fari sian devon, se estas je dispono sufiĉe da pensionpago kaj sufiĉe da maljunulejoj. Certe, ambaŭ necesas, sed mono sola – ĝuste en tiu kazo – ne feliĉigas, kaj maljunulejojn bezonas kaj ŝatas nur inter 3 kaj maksimume 10 procentoj de la grizuloj. Kion faras la ŝtatoj por la restaj 90 procentoj?

Enketoj en la diversaj ŝtatoj naskas magran rezulton. Dum ĉie ekzistas – ofte tre multekostaj – programoj por junulara politiko, maljunulara politiko preskaŭ ne ekzistas. „Antaŭ la balotoj oni promesas ĉion al ni," plendas funkciulo de germana maljunula organizo, „sed tuj poste la politikistoj forgesas nin – ĝis la sekvonta baloto . . ."

Tamen, preskaŭ en ĉiuj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko intertempe la maljunuloj organizis sin por helpi sin mem. Laŭ modelo de „Nigraj Panteroj" (la radikala negro-grupo) en Usono Maggie Kuhn gvidas sian mildradikalan grupon „Grizaj Panteroj" (kompreneble grizaj pro la hararo), jam kun certa sukceso. Aliaj organizoj koncentriĝas je sociala servado, aranĝas proprajn feriojn por siaj membroj, eldonas proprajn revuojn. En Svislando kaj FR Germanio ekzistas duonoficialaj „fondaĵoj por maljunaĝo" kun similaj taskoj. Grandaj firmaoj ofertas kursojn al siaj kunlaborantoj, por prepari ilin por la fazo post pensiiĝo. Tuta aro da kluboj de maljunuloj ekzistas sur urba ebeno. Sed ofte ĉi tiuj aktivaĵoj atingas nur parton de la maljunularo – kaj krome kaŝiĝas en tio la danĝero de geto: Oni kuniĝas, sed izoliĝas sin de la ĝenerala socio.

Finfine ankaŭ estas generacia problemo; la nun maljunaj homoj pro la mankoj de la lerneja edukado antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito, kaj pro la malfaciliaĵoj postmilitaj, ne ĝuis tiel bonan edukiĝon kaj sekve de tio ankaŭ ne havas la necesan scion. Ĉar ankaŭ ĉi tio estas ekkono gerontologia: Akademiano pli bone majstras sian maljunaĝon ol laboristo, kiu dum sia tuta vivo faris nur monotonajn manlaborojn.

Kaj ĉar intertempe maljuniĝas jam tiuj homoj, kiuj ĝuis pli bonan kleriĝon, montriĝas ioma ŝanĝiĝo en la sinteno de la maljunularo. La pli junaj grizuloj estas ofte jam multe pli aktivaj ankaŭ post la profesia fazo ol ekzemple homoj hodiaŭ 80 jarojn aĝaj. Estas verŝajne tiuj „novaj" grizuloj, kiuj respondis al la demando pri 150jariĝo „jes". Espereble ĝis tiam ankaŭ estos kreskinta la respekto kontraŭ la grizularo, pri kies manko inter la junuloj kaj – eĉ pli – mezaĝuloj hodiaŭ plendas tiom multaj grizuloj (kaj kalvuloj).



*Hobion oni ne lernas dum la lastaj vivojaroj. Muzoj, ŝatitaj dum junaĝo, ofte revenas – bona medikamento kontraŭ enuo*

## AZILPROBLEMOJ


# Kiu estas rifuĝinto?

Dekomence inter la ĉefaj taskoj de l' tiama Ligo de Popoloj estis ankaŭ helpo kaj protektado por rifuĝintoj. Tiutempe tamen la interkonsento havis striktigan karakteron. Hodiaŭ, precipe post akcepto de la konvencio de 1951, temas pri aktiva jurprotekto, kaj ekde 1954 la Alta Komisaro por Rifuĝintoj povas ankaŭ materie helpi, ekde 1957 eĉ havas jaran buĝeton. La Alta Komisaro ne respondecas al la Ĝenerala Sekretario de UN, sed rekte al la asembleo mem, do estas relative aŭtonoma. Intertempe, per protokolo de 1967, oni forigis ankaŭ la limdaton 1951 (kio signifis, ke sub lia protekto estis nur rifuĝintoj el la tempo antaŭ tiu dato) kaj tiel la Alta Komisaro kompetentas ankaŭ estonte por ĉiuj rifuĝintoj.



*Pli ol 3,5 milionojn da rifuĝintoj en la tuta mondo . . .*

Malfaciliaĵojn tamen ne tiom kaŭzas la alta nombro de rifuĝintoj (momente ĉ. 3,5 milionoj!) nek la financoj, sed ĉefe estas juraj problemoj, pri kiuj oni rezonas ĉe UN en Ĝenevo, kie ankaŭ sidas la Alta Komisaro por Rifuĝintoj. Azilon kaj la koncernajn konvenciojn oni povas difini vaste aŭ strikte; des pli malfacile estas difini „politikan persekuton", kio ja estas bazo por azilrajto. „La Alta Komisaro vidas ĝin liberale," klarigas Ivor C. Jackson (pron. Ĝeksn), asistanta direktoro de la jura departemento. „Sufiĉas, ke subjektive rifuĝinto timas persekuton kaj havas bonajn argumentojn, eĉ se efektive ĉi tiu homo ne estis persekutita hejme."



*. . . estas sub la protekto de Alta Komisaro por Rifuĝintoj, M. Poul Hartling (dano)*

Tamen ne ĉiu lando agnoskas ĉi tiun liberalan starpunkton. Kaj landoj, kiuj agas tiel, facile havas neantaŭviditajn malfacilaĵojn, kiel momente Federacia Respubliko Germanio. Ĉi tiu ŝtato havas – oni miru! – kiel ununura konstitucie fiksitan azil-rajton: „Politike persekutitoj ĝuas azilon", oni legas en ĝia konstitucio, kaj tio signifas individuan rajton. Azilpetanto ekde tiu momento, kiam li alvenas ĉe la landlimo, ĝuas plenan juran protekton, kiel ŝtatano. Pro ĉi tiu liberala azil-rajto dum lastaj jaroj amase venas azil-petantoj en FR Germanion, kiuj fakte ne estas politike persekutataj, sed ĉefe foriras el sia hejmlando pro tieaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Oni tial nomas ilin „ekonomi-rifuĝintoj". Por 1978 FR Germanio atendas proksimume 30.000 tiajn rifuĝintojn.

La kalkulo de la alvenantoj estas simpla: Pro la kompleta jura pro-



*Nur malmultaj boat-rifuĝintoj (kiel tiu sur nia foto) sukcesas atingi savan havenon. Multaj dronas en netaŭgaj ŝipetoj aŭ estas prirabataj de piratoj kaj tiel malriĉiĝas*

tekto procesoj tra ĉiujn instancojn daŭras ofte kvin kaj pli multajn jarojn. Tio signifas, ke eĉ se fine ili ne estas agnoskitaj azilantoj, ili povas reiri hejman relative riĉaj, ĉar dum la restado en Germanio ili ja povis labori kaj ŝpari monon. Nun oni preparas leĝon, kiu iomete mallongigu la procedojn, sed pro la amasoj jam restantaj en la lando kaj la amasoj ankoraŭ venontaj ĉi tiu mallongigo ne multe helpos.

Kial ĝuste FR Germanio havas tiel liberalan azil-rajton? La konstitucion post la dua mondmilito ellaboris germanoj, kiuj grandparte mem devis peti dum antaŭaj jaroj azilon en aliaj ŝtatoj. Iliajn spertojn unu el ili, Bert Brecht (pron. Breĥt), priskribis tiel: „Plej nobla parto de l' homo estas pasporto . . ."

Ne malmultaj fakuloj tamen pledas, ke rifuĝinto en jura senco estu ne nur vere politike persekutito, sed ankaŭ „ekonomi-rifuĝinto". Ili argumentas: Ekonomia mizero en iu ŝtato ja estas iamaniere ankaŭ kaŭzita per difektita homa rajto, kaj difekti homajn rajtojn egalas al persekuti homojn politike.

En Genevo oni intertempe forte diskutas ankaŭ la demandon, ĉu vere estas favore por rifuĝintoj el foraj aziaj landoj transpreni ilin al Eŭropo aŭ Ameriko; simile oni argumentas ĉe afrikanoj, kiuj rifuĝas pro militoj. Tial oni pli kaj pli klopodas setligi tiujn homojn en najbaraj landoj aŭ teni en kampadejoj, kie ili povas atendi la tagon de reiro hejmen. Ja eĉ en certaj kazoj la Alta Komisaro por Rifuĝintoj nun povas helpi en la lando mem, kie estas milito. Certe pli humana metodo ol senradikigi homojn kaj devigi ilin vivi en alia kontinento kun tute alia medio, alia kulturo, alia raso, alia lingvo.

Speciala, ĝis nun ne solvita problemo estas la tielnomataj „boat-rifuĝintoj", kiuj en mizerstataj boatoj forlasas sian hejmlandon. La boatoj ofte estas troŝarĝitaj kaj sinkas. Multaj kapitanoj de komercaj ŝipoj ne plu transprenas rifuĝintojn ĉar neniu lando volas preni ilin, tiel ke la ŝip-posedantoj havas grandajn malgajnojn pro la multa tempo, kiun kapitanoj bezonas por liberigi siajn ŝipojn de la homa ŝarĝo. Oni eĉ ne povas taksi la nombron de homoj, kiuj pro tiu dilemo jam mortis, ĉar neniu zorgis pri sinkanta; boatoj.

Aliflanke fakuloj emfazas, ke rifuĝintoj ĝenerale por la akceptanta lando estas bona „kapitalo". Car tiuj homoj ja bezonas grandan energion kaj fleksemon, fortan volon kaj pretecon por nove komenci, se ili faras ĉi tiun vere decidan paŝon, forlasi sian hejmlandon. Ci tiun energion, tian fleksemon kaj tian fortan volon ili des pli havos en la nova ŝtato. Tielvide ĉiu lando, akceptanta rifuĝintojn, agas ne nur bone por ili, sed ankaŭ por si mem. O.B.S.

SKOTLANDO

## Sendependiĝo malhelpata

Skotlando estas unu el la kvar regionoj, kiuj konsistigas la Unuiĝintan Reĝlandon de Granda Britujo. Ĝia loĝantaro, rase tre miksdevena, nombras 5,2 milionojn, kompare kun 48,7 milionoj en Anglujo-Kimrujo.

En 1707 ĝia parlamento demisiis kaj brita parlamento estis starigita en Londono, en kiu hodiaŭ Skotlando havas 71 parlamentanojn el 635. La Akto de Unuiĝo (1707) tamen garantiis kelkajn rajtojn al la skotoj, tiel ke ankoraŭ nun Skotlando diferencas de la cetera Britujo en kelkaj rilatoj. Ĉefa diferenco estas la jursistemo, kiu tiel funde diferencas de la angla jursitstemo, ke advokato en unu „lando" ne rajtas – respektive kompetentas – praktiki en la alia. Plej kurioza karakterizo de la skota juro el laika vidpunkto estas, ke apud la verdiktoj „kulpa" kaj „senkulpa" la skotoj havas trian: „nepruvita".

Aliaj rajtoj de la skotoj estas aparta eduksistemo kaj aparta oficiala religio (anglikana en Anglujo, presbitera en Skotlando – apud signifa proporcio de romkatolikoj). Skotlando havas ankaŭ proprajn bankbiletojn – eĉ tri diversajn! – kiuj egalvaloras la anglan pundon.

La plimultaj skotoj depost 1707 neniam perdis fortan senton pri sia nacia aparteco, kaj tion kunportis kun si la multnombraj elmigrintoj al britaj kolonioj. Hodiaŭ en kelkaj partoj de orienta Kanado la homoj ŝajnas kelkfoje „pli skotaj ol la skotoj".

Tiu nacia sento en Skotlando tamen restis grandparte sentimenta, kaj malofte, ĝis lastatempe, trovis politikan agadformon. Skotnacia Partio celanta kompletan „sendependiĝon" de Skotlando estis fondita en 1934, sed dum multaj jardekoj ĝi estis tute senefika, neglektata kaj ofte eĉ mokata de la grandega plimulto.

Kiam en 1950-52 okazis tutnacia kampanjo por skota parlamento – kiu kulminis kiam kelkaj studentoj ŝtelis en Londono kaj forportis al Skotlando tradician kronadan ŝtonon, sur kiu iam sidis la kronataj skotaj reĝoj – tion malmulte influis la Partio.
En 1967 okazis la trarompiĝo. Advokatino Winnie Ewing estis elektita kiel skotnacia parlamentano. (Nur unu fojon antaŭe, en 1945, okazis tio.) En la tri postaj balotadoj okazis lavango de sukcesoj, jene: 1970: 1 parlamentano (voĉoj por la partio 306.796); 1974 (feb): 7 parlamentanoj (voĉoj 632.032); 1974 (okt): 11 parlamentanoj (kaj 2a loko en 42 aliaj balotoj, voĉoj 839.628).
Estis jam evidente, ke la defio de la partio, kiu celas kompletan sendependiĝon, estas serioza kaj akiris fortan subtenon de la publiko. La registaro (laborpartia, kun minimuma plimulto da voĉoj) promesis starigi en Skotlando, kiel ankaŭ en Kimrujo, apartan asembleon, elektitan de la skotoj, resp. kimroj, kiu prizorgos por Skotlando diversajn iom gravajn aferojn, kiel publikan sanon, planadon, landvojojn k.s. Financon kaj eksterlandajn rilatojn, kaj aliajn kernaĵojn, daŭre prizorgos tamen la centra registaro en Londono. Per tia parta cedo la registaro esperis likvidi la ĥimeron de kompleta sendependiĝo.
Aŭ, eble, ĝi esperas trapasi la epokon de entuziasmo, atendante same subitan kolapson de la skota kampanjo, kia estis la kresko? Jam pasis kvar jaroj, kaj ankoraŭ la necesa leĝaro rampas malrapide, oponata kaj ŝanĝata je ĉiu paŝo. Ĉiuj partioj krom la skotnacia esence kontraŭstaras al „dissplitiĝo de la reĝlando“ kaj kaptas ĉiun eblecon malhelpi rapidan solvon. La plej nova rimedo estas, ke oni demandos al la skota popolo per referendumo, ĉu ĝi fakte deziras la apartan asembleon. Minimume 40 % de la nacio devos respondi jese al tiu demando – kaj multaj dubas, ke tia proporcio estas atingebla.
Kio kaŭzis la subitan sukceson post tiom ege da stagnado? Du ĉefaj respondoj prezentiĝas. Unue, la eltrovo de nafto sub la Norda Maro apud Skotlando malfermis horizontojn de nova ekonomia prospero. Kaj due, la koncepto de skoteco kaptis la fantazion de miloj da ĉefe junaj subtenantoj. La junularo – ne malprave – trovas la establitajn partiojn maljunecaj kaj eksmodaj kaj salutas la promeson de freŝaj fortoj. Sed ĉu tiu entuziasmo ne velkos pro la londonaj prokrastoj? Tion montros interalie la proksimaj balotoj. W. A.


**ENERGIO**

## Oni devas ŝpari nafton

Se la industri-ŝtatoj ne konsiderinde reduktas sian petrol-konsumon, ili ne atingos la mem metitan celon, ĝis 1985 importi ne pli ol 26 miliardojn da bareloj da nafto potage. Laŭ la lasta raporto de Internacia Engergi-Agentejo oni devos kalkuli en 1985 bezonon de proksimume 42 ĝis 48 miliardoj da bareloj po tago, sed la hafteksportantaj landoj povos oferti nur 36 ĝis 38 miliardojn.
La ĵus, dum la konferenco de l' sep plej grandaj okcidentaj industri-ŝtatoj en Bonn, decidita reduktado estas ĝis nun nur papera fakto. Jam pasinttempe la usona prezidanto promesis tian redukton, sed ĝis nun nur parte plenumis ĝin. Oni devas atendi, ĉu nun Usono, unu el la plej grandaj petrol-konsumantaj ŝtatoj, efektive ŝparos. Por la ordinara aŭtomobilisto en Usono tio alportus gravan perdon, ĉar en la programo unu el la ĉefpunktoj ja estas, plialtigi la benzinprezojn.
Fakte ne tute konforma al la tendenco, redukti nafto-konsumadon, estis la decido dum la lasta konferenco de l' nafteksportantaj ŝtatoj en Ĝenevo, ne altigi ĉi-jare la prezojn. Pli altaj prezoj certe ne nur bremsus la senzorgan foruzon, sed ankaŭ urĝus evoluigi aliajn energiojn kiel ekzemple sunradian kaj karban.
Sed la naftoŝtatoj argumentas alie: Se oni altigas la prezojn, tio bremsas investadon kaj mondkonjunkturon kaj krome pligrandigas la inflacion ĉefe de l' usona dolaro – kaj jen la dilemo: La naftoŝtatoj enkasigas ĉefe usonajn dolarojn kaj ne volas transiri al




**Baldaŭ naftodeficito?**
ĉiutaga ekstraktado resp. konsumado de nafto el la nafteksportantaj ŝtatoj (miliardoj da bareloj)




*Benzin-konsumado estas aparte alta en Usono (foto maldekstre)*

aliaj valutoj (kvankam oni jam forte diskutas tion).
Tiel la naftoprezo estas multfaceta, ĉiukaze politika kaj ne plu nur ekonomia prezo. Nelaste ankaŭ problemoj de l' evolulandoj ludas rolon. Kaj certaj ŝtatestroj kaj registaroj scias: Se ni tro rapide fordonas niajn naftorezervojn, iun tagon ni staros kun malplenaj manoj. Ĉar precipe en dezertaj landoj krom nafto ja ne ekzistas aliaj riĉaĵoj, nek sufiĉa industrio aŭ ebleco produkti agrikulturajn varojn.
Dum la lastaj jaroj tial ne malmultaj registaroj investis en okcidentaj industrioj; sed ĉar tie intertempe la progreso lamas, ankaŭ ĉi tiu elirvojo ne promesas grandiozan estontecon por naftoŝtatoj. La eŭforio de l' unuaj jardekoj ĉiukaze cedis ankaŭ tie al pli prudenta kaj singarda sinteno. K. P.

## TRAFIKO

# 500 km po horo

Japanio kaj Britio momente disponas pri la plej rapidaj trajnoj. Sed ĉe proksimume 200 km/horo trajnoj sur ordinaraj feraj reloj atingas limon; estus tro riske, pli rapide veturi per ordinara lokomotivo.
Intertempe en FR Germanio teamo el tri firmaoj (AEG, BBC kaj Siemens), subvenciata de ministerio por esplorado kaj teknologio, jam dum pluraj jaroj eksperimentas evoluigi pli rapidan trajnon. Nun la unua fazo, dum kiu oni testis du konkurajn sistemojn, estas finita. Oni daŭrigas la evoluigon de „senfera sinkrona Langstator-linearmotoro“, kiu konsistas el du komponantoj: kablovolvaĵo nutrata per trifaza kurento en la vojo kaj ekstreme konduka magneto en la veturilo. La volvaĵo estigas laŭvojan elektromagnetan migrantan kampon, per kiu estas „kuntirata“ la forta, je minus 269 gradoj C malvarmigita magneto, sentuŝe. Dum la veturado ĝi bezonas nenian energion de ekstere, ĉar la kurento – unu fojon enkondukita – pro la ekstrema konduk-efiko ne plu malkreskas.



*Koloso kun 17 tunoj: ĉiu tiu magneta ŝveb-veturilo sur betona vojo povos aviadil-rapiде veturi, nome 500 km/horo*

Ĉi tiu nova motorsistemo por magnet-ŝvebveturiloj ebligos rapidecojn ĝis 500 km/h. Se la evoluo finiĝos sukcese, jen oni havos trafiksistemon, kiu kombinos la rapidecon de aviadilo kun la sekureco de fervojo. Ĉiukaze interesa afero almenaŭ por kontinenta trafiko.

## SINDIKATOJ

# Sufiĉas 35 horoj

Laŭ opinio de Bruno Kreisky, aŭstria federacia kanceliero, signifas „difekti la homajn rajtojn“, ke en Eŭropo nuntempe 17 milionoj homoj estas sen laboro. Fakte, se – kiel ekzemple postulas sindikatoj en FR Germanio – oni agnoskas ankaŭ homan rajton je laboro, li pravas. Tamen por sindikatoj en okcidenta Eŭropo la senlaboreco kaŭzas dilemon. Oni urĝas ilin kaj de registara kaj de industriista flankoj, rezigni pri postuloj je altigo de salajroj, kaj argumentas: Pli altaj salajroj signifas pli altajn kostojn por industriaj produktoj; tial, por resti konkurenckapabla, fabrikoj devas racionaligi – kaj tio signifas maldungi laboristojn. Tiel do sindikatoj kulpas pri plimultiĝo de l' senlaboruloj . . .
Certe, tipe kapitalista argumentado. Tamen, en kapitalisma eko-

## DOKUMENTO DE L' SEMAJNO

### Bojkoto pro terorismo

La ŝtat-kaj registarestroj de Britio, Francio, FR Germanio, Italio, Japanio, Kanado kaj Usono dum sia konferenco meze de julio 1978 en Bonn publikigis komunan deklaracion pri aerpiratado, kies plena teksto estas:

La ŝtatestroj kaj registarestroj – zorgoplenaj pro terorismo kaj kaptado de garantiuloj – deklaras, ke iliaj registaroj intensigos komunajn klopodojn por batali kontraŭ internacia terorismo. En kazoj, ke lando rifuzas transdoni aŭ meti antaŭ tribunalon aviadilpiratojn resp. ne redoni tiajn aviadilojn, tial la ŝtat-kaj registarestroj komune decidemas, tuj zorgi per siaj registaroj, ke ĉiuj flugoj al tiuj landoj ĉesos. Samtempe iliaj registaroj enkondukos paŝojn, por ke ĉiuj alflugoj el tiu lando kaj per aertransportaj entreprenoj de tiu lando el iu alia lando estu interrompataj. Ili emfaze apelacias al aliaj landoj, aliĝi al ĉi tiu sindevigo.

nomi-sistemo ne tute senfunda argumento. Por forigi ĝin, oni fakte devus ŝanĝi la sistemon. Tamen okcidentaj sindikatoj kutime ne volas ŝanĝi ĝin, simple ĉar iliaj membroj ne komprenus tian postulon: Ili vivas tiel bone kiel neniam antaŭe, en ĉi tiu sistemo. Ilia prefera deziro: Sekurigi laborlokojn. Por tion atingi, granda parto de l' germana laboristaro eĉ estas preta, rezigni pri grandaj salajraltigoj.

La sindikatoj komprenis la signalojn. Sed ĉar sindikato en kapitalisma sistemo havas ekzistorajton nur tiom, kiom ĝi servas al siaj membroj, kiom ĝi plibonigas financan kaj socialan situacion de l' membraro, oni serĉis kaj trovis aliajn labor-kampojn: Nun la sindikatoj ne unualinie batalas por pli altaj salajroj, sed por plibonigo de la sociala situacio.

Unu el la novaj sloganoj: Humana laborloko – do batalo kontraŭ troa bruego, por freŝa aero, kontraŭ akcidentoj, por pli bona medicina prizorgado k.s.

Alia postulo: Malaltigi la nombron de laborhoroj. Dum la lastaj tarifkonfliktoj en FR Germanio gravan rolon ludis ekzemple la plilongigo de la jara libertempo. Grandparte la sindikatoj atingis tiun celon. Nun oni – sur sama vojo – antaŭenmarŝas: Britaj kaj germanaj sindikatoj postulas 35horan laborsemajnon. En Britio, kie jam dum tri jaroj la salajroj per la registaro estas kontrolataj, ĉi tiu postulo estas tre disputata. Sed ankaŭ ĉefministro Callaghan supozeble ne troe kontraŭas enkonduki 35horan laborsemajnon, ĉar tiel li povas gajni la sindikatojn por kvara jaro de bremsitaj salajroj.

En ambaŭ landoj la sindikatoj havas bonajn argumentojn: Redukti la semajnan labortempon de 40 al 35 horoj helpas redukti la nombron de senlaboruloj. Kiomgrade, tion tamen neniu povas ekzakte prognozi. Britaj sindikataj sciencistoj kalkulas 890 000 novan laborlokojn en plej favora kazo, kaj 190 000 en plej malfavora. La brita labor-ministerio taksas inter 100 000 kaj 480 000 novajn laborlokojn. Aliflanke la industriaj ligoj asertas, ke redukto al 35 horoj po semajno tiom premus la fabrikojn, ke pro konkurenco internacia oni devus nuligi minimume 100 000 laborlokojn – kaj tiel tute ne helpus al senlaboruloj. Tiu aserto baziĝas sur la – memkomprenebla – postulo de la sindikatoj, redukti la labortempon sed pagi la ĝisnunan semajnan salajron. Por kontesti tian argumentadon, la sindikatoj postulas, ke la registaro estu modela kaj enkonduku unue en la propraj, do ŝtataj entreprenoj 35horan laborsemajnon.

La ŝtalindustria ligo de FR Germanio intertempe ankaŭ rifuzis, por sia branĉo, 35horan laborsemajnon. Tiu decido, cetere, estiĝis kun la voĉoj de la laboristaj reprezentantoj en la ligo. Efektive la ŝtalindustrio estas en aparta situacio. Aliflanke oni proponas al la sindikatoj, plilongigi la jaran libertempon.

Sed ĝenerale ankaŭ la germanaj sindikatoj preferas redukti la semajnan labortempon, tutsimple ĉar tio estas videbla kaj montrebla atingaĵo, se fakte laboristo estonte povas libertempi dum vendredo ĝis dimanĉo, do tri plenajn tagojn dum semajno.

Sociologoj tamen avertas. Jam nun multaj problemoj estas kaŭzataj pro multa libera tempo, kiun nur malmultaj homoj vere scias eluzi. Tial oni devos oferti al la homoj pli multajn eblecojn, pasigi pli longan liberan tempon utile kaj sencplene. Unu industria branĉo certe profitos: Libertempa industrio, de fiŝkaptil-produktantoj ĝis turismaj entreprenoj. Eble nur la infanoj ne ĝojos, ĉar ili devos sidi en lernejoj ankaŭ vendrede, kiam la patro ferias . . . S. M.

## TEKNIKO

# Novaĵo por blinduloj

Estas hodiaŭ preskaŭ neimageble, rezigni je elektronikaj kalkulmaŝinoj por ĉiutagaj matematikaj laboroj. Sed blinduloj ĝis antaŭ mallonga tempo devis rezigni pri ĉi tiu teknika progreso. La elektronika kalkulilo kun brajlaj signoj, antaŭ kelka tempo prezentita per AEG-Telefunken, demonstras, ke la moderna tekniko povas plibonigi ankaŭ la ŝancojn de handikapitoj. Ĉi tiu porblindula



*Elektronika kalkul-maŝineto kun brajlaj signoj*

kalkulmaŝino kun 47 matematikaj funkcioj taŭgas kaj por ampleksaj teknik-sciencaj kaj por komercaj problemoj. Ĉiuj datoj, kiujn vidanto povas legi sur la maŝino, estas donitaj per brajla linio kun ok eroj kaj antaŭsigno (do palpeblaj). Grandaj premiloj ebligas simplan kaj sekuran uzadon.
La pozitiva eĥo el blindulaj lernejoj en Aŭstrio kaj Germanio, kie oni elprovis ĝin, estas pruvo ke ĉi tiu kalkul-maŝino estas tre laborfaciliga. Montriĝas, ke oni ankoraŭ povas trovi multajn helpilojn per modernaj teknikaĵoj por handikapitoj. La sama firmao ekzemple nun evoluigas legmaŝinon por blinduloj, kiu ebligu transigi nigre presitajn al brajla skribo.



*Germana prezidanto W. Scheel (pron. Sel) ĝojas renkonti japanan reporteron kun germana fotilo*

## JAPANIO

# Foto-monopolo

Kanceliero Helmut Schmidt demandis la reporterojn: „Kiu el vi uzas germanan fotilon?" Singêna silento inter la aro de profesiaj fotografoj; ĉiuj ŝatas kaj uzas japanajn aparatojn. Tion la kanceliero ankaŭ ne ŝanĝis, kiam kelkan tempon poste dum iu eksterlanda vojaĝo li demonstracie amator-fotografis per germana apparato. Li ne povis konvinki iun ajn fotografon, ĉu profesian ĉu amatoran, pri pli granda kvalito de la germana fotoindustrio.
Sed iam ĉi tiu konvinko estis mondvasta: Germanaj fotofirmaoj Leitz-Leica, Zeiss kaj Rollei ĝuis mondfamon pro siaj spegulrefleks-kameroj; ili inventis altnivelajn malgrandformatajn fotilojn. Sed hodiaŭ? „Kiu volas aĉeti unuaklasan kameron, teknike modernan, kompreneble prenas japanan aparaton de Canon, Minolta, Nikon, Asahi, Jaŝika aŭ Olympus." Tion diras germana foto-vendisto. Fakte eĉ la tradiciriĉan germanan fotomerkaton la japanoj uzurpis je tri kvaronoj.
Tamen ne nur temas pri tekniko, precizeco kaj perfekteco, iamaj epitetoj de kameroj produktitaj en Germanio, sed ankaŭ pri la prezo: Similkvalitaj germanaj kameroj ofte kostas duoblan ĝis trioblan sumon! La japanaj fotofirmaoj vendas senkonkurence malmultekoste. Ankaŭ ne helpas, ke germanaj firmaoj finproduktas en Portugalio (kiel Leitz) aŭ nun jam komplete produktas en Singapuro (kiel Rollei).
Kiel povis okazi? Tutsimple ŝajnas esti trofiero de germanoj, fidantaj je sia renomiteco, pro kio ili dormis. Dume la japanoj inventis kaj esploris. Hodiaŭ ĉiuj veraj, ofte sensaciaj novaĵoj en la fotobranĉo venas el Japanio. Jam estas profetoj, kiuj prognozas, ke post dek jaroj same okazos en la aŭtomobil-branĉo.

## MEMOROJ

# Konkurso por grizuloj

La historiaj libroj estas plenaj de faktoj, datoj kaj eventoj. Sed nur malofte ili donas respondon al la demando: Kiel vivis la homoj tiutempe? Kiuj estis la ĉiutagaj zorgoj, problemoj, ĝojoj, distroj, laboroj, manĝoj?



Jen breĉo, kiun povas plenigi vi kaj tiel konservi por postaj generacioj valorajn detalojn el la historio.
Tial SEMAJNO apelacias al ĉiuj grizharuloj (ankaŭ kalvuloj, kompreneble!) skribi siajn memorojn. Ni estas certaj, ke ili estos minimume same legindaj kiel la memoroj de usona eksprezidanto Nixon (pron. Niksn) kaj aliaj eminentuloj.
La plej bonaj verkoj aperos en SEMAJNO. Kompreneble ni pagos por ĉiu publikigita verko honorarion. Do ek al la laboro! Kondiĉo: nur tajpitaj manuskriptoj estas akceptataj; se vi mem ne posedas skribmaŝinon, vi certe trovos amikon aŭ konaton, kiu helpos vin.
Limdato ne ekzistas, ĉar jen temas pri konstanta „konkurso"; kaj vi ne estu urĝata. Certe vi klopodos, ne skribi (longan) romanon, sed (koncizan) raporton. Ankaŭ interesa epizodo jam povas havi ŝancon, aperi en SEMAJNO.
Kiu estos la unua aŭtoro? Skribu sub la rubriko „memoroj" al la redakcio de SEMAJNO, S. Maul, Singerstraße 1/III, D–8900 Augsburg, FR Germanio.

# Intelektuloj en embaraso

Oni ne devas akcepti la opinion de l' iama ĉefo de usona sekreta servo CIA, William Colby, kiu diras, ke la uganda popolo havas moralan rajton, mortigi diktatoron Idi Amin. Pli facile estas akcepti lian prognozon: „Mi ne kredas, ke Idi Amin mortos laŭ natura maniero." Ugando estas unu el tiuj afrikaj landoj, kie precipe intelektuloj suferas, ĉar ili havas nenian liberecon. Sekve de tio multaj, ja preskaŭ ĉiuj rifuĝis. Amin, preskaŭ analfabeto, suspektas ĉion, kion li ne povas kompreni. Ne nur politikaj kontraŭuloj estas persekutataj en Ugando, sed ankaŭ intelektuloj. 1972 estis murdita Frank Kalimuzo, rektoro de la universitato Makarero.




*Rifuĝintaj afrikanoj; intelektuloj ofte iras al Eŭropo aŭ Norda Ameriko*

Se oni rigardas la historion, la situacio de la intelektularo en orienta Afriko iam estis tre ĝojiga. Dum la kolonia erao la 1922 fondita universitato de Makarero estis la fonto de orientafrikaj intelektuloj. Gi estis unu el la plej bonaj afrikaj universitatoj, kun bona internacia reputacio. Multaj ŝtatestroj kaj ŝtatoficistoj afrikaj venis de tiu universitato, ekzemple ankaŭ Julius Nyerero, prezidanto de Tanzanio. 1949 Makarero fariĝis oficiala „Universitata Kolegio de Orienta Afriko" kaj ligis sin kun la Londona universitato.

Krome oni fondis universitaton en Najrobio kaj Daresalamo. Ankaŭ post memstariĝo de Ugando, Kenio kaj Tanzanio oni daŭrigis la kunlaboron laŭ la modelo de la Orientafrika Universitato, ja ĝi multe influis la politikan kaj ekonomian kunlaboron de tiuj tri landoj, kiuj en 1967 fondis la Orientafrikan Komunon. Oni esperis, ke la komuna universitato daŭre firmigos la senton de regiona kunligiteco de la tri ŝtatoj. Sed kreskanta naciismo unuflanke kaj la kresko de la aliaj universitatoj aliflanke efikis, ke la komuna universitato perdis valoron – ankaŭ ĉar ĝi kaŭzis pli grandajn kostojn ol la naciaj universitatoj. Kaj fakte la malfondiĝo de la komuna universitato (kiu ekde 1970 estis nur uganda universitato) de Makarero signalis la disfalon de la orientafrika komuno. Tamen oni strebis daŭrigi almenaŭ la kunlaboron inter la intelektuloj de la tri landoj.

Kia estas la situacio de intelektuloj en orienta Afriko hodiaŭ? Artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj diras, ke ĉiu homo havas rajton de libera opiniesprimo. Sed multaj afrikaj intelektuloj hodiaŭ vivas eksterlande, ĉar hejmlande ne plu ekzistas vera intelekta libereco, necesa por scienca laborado.

Ali Mazrui, eksprofesoro de politikaj sciencoj en Makarero, nun vivanta eksterlande, asertas ke la intelektula libereco en Afriko frontas du tiranecojn: Unu estas la „eŭrocentrismo" de la scienco en Afriko, do la troŝarĝiĝo per eŭropaj valoroj, perspektivoj kaj orientiĝoj. Oni ofte provas solvi ĉi tiun problemon, nur oni devas esti singarda kaj ne anstataŭigi eŭrocentrismon per afrik-centrismo. Afrikaj intelektuloj provas ellabori tion, kio estas unika en afrikaj historio kaj kulturo. Certe oni ankoraŭ ne adekvate ekkonis la profundecon kaj poezian senton de afrikaj ideoj kaj la signifon de afrikaj atingoj en arto, komerco kaj regado. Sed la afrikaj intelektuloj devas esti singardaj, se ili emfazas tiun „afrikan personecon" (Leopold Senghor), kvazaŭ ekzistus specifa afrika maniero de intelekto. Tio signifus, ke afrikan intelekton oni ne povas mezuri laŭ universalaj metodoj. Se la scienco montras, kiel diferencaj estas homaj kulturoj, ĝi samtempe montru al ni, kiel la homoj, posedantaj diversajn kulturojn, esence estas similaj.




Tial mi opinias, ke la minaco por afrika libereco de intelekto ne tiom venas el ia eŭrocentrismo, sed ke ĝi venas el la afrikaj landoj mem. En multaj landoj de tiu kontinento la citita artikolo 19 estas konstante vundata. En kelkaj regas ia patriarkismo, ĉefe kie ankoraŭ estras la ŝtaton la „fondo-

patro". Tiuj unuaj ŝtatĉefoj suspektas facile ĉiun (de la propra) diferencan opinion – sed opinidiferencoj estas esencaj por viva intelekta atmosfero. En Kenio la sistemo de (strebata) kvazaŭfamilia interkonsento naskas malfacilaĵojn – studentaj ribeloj demonstras tion. Sed ankaŭ eminentaj intelektuloj ne povas libere diri sian opinion. Ngugi, plej konata publicisto de orienta Afriko kaj direktoro de la instituto por literaturo de la universitato en Najrobio, verkis libron, en kiu li kritikis la gvidan eliton de Kenio. Oni enkarcerigis lin fine de lasta jaro.
Tamen oni povas diri, ke Kenio ĝenerale havas relative bonan famon koncerne la atentadon de homoj rajtoj. Eĉ oni povas aserti, ke la kenia parlamento estas unu el la plej liberaj de l' tuta afrika kontinento. Mi kredas, ke la maltrankvilo inter la studentaro kaj la libereco de la parlamento kondukos al pli granda toleremo en Kenio. Eble tiel estos gardata la intelektula libereco en Kenio.
En Tanzanio la politikaj eventoj dum la 60aj jaroj kaŭzis grandajn zorgojn al multaj intelektuloj. Kiam 300 studentoj post protestoj kontraŭ deviga nacia servo estis forigitaj el la universitato, oni timis pri ĝia aŭtonomio. En 1970 prezidanto Nyerero nomis celon de la universitato, evoluigi socialistan Tanzanion. Kiam inter la profesoroj ekestis timoj, ke nun ili estu ideologie fiksitaj, la prezidanto pli vaste difinis la nomitan celon kaj akcentis, ke oni devas diskuti pri la vojo al socialisma Tanzanio. Tiel la principo de libereco do validas, sed mi avertas, ke jen oni ne eraru laŭ afrik-centrismo: Nek la mirakloj de kapitalismo en Kenio nek la fiaskoj socialismaj en Gano, Gvineo kaj Malio estas argumentoj kontraŭ la nekapitalisma evoluvojo de Afriko. Afriko ne devas dubi pri sia ekonomia estonteco. Sed ĝi devas krei la politikajn kondiĉojn kaj sanan socian evoluon, kaj al tio apartenas la rajto de libera opinio. La situacio en Tanzanio pliboniĝis; laste oni liberigis 40 politikajn kaptitojn.
Tute alie en Ugando, kie oni taksas la nombron de mortigitaj homoj je 1 miliono, inter ili multaj ministroj, ĵurnalistoj, oficistoj, advokatoj, kuracistoj, komercistoj, profesoroj kaj studentoj.
Bedaŭrinde multaj afrikaj registaroj restis senmovaj. Organizo de Afrika Unuiĝo (OAU) okupiĝas nur pri rasismo en Sudafriko, sed – laŭ principo de neinterveno ĉe internaj aferoj – ne pri aliaj ŝtatoj.
Almenaŭ multaj rifuĝintoj el Ugando trovis azilon en Kenio, Tanzanio kaj Zambio. Intelektuloj trovis laboron en la universitatoj. Sed tre multaj intelektuloj ugandaj iris ankaŭ en okcidentajn landojn. Ili reiros nur, kiam ne plu regos Idi Amin. La demando nur estas: Ĉu tiam ili ankoraŭ volos reiri hejmen? Certe estus pli bone, se rifuĝintajn intelektulojn oni principe kaj precipe akceptus en aliaj afrikaj ŝtatoj. De tie ili pli facile povos reiri hejmen kaj tiel ne perdiĝas por la afrika kulturo. M.A.

## EŬROPA KOMUNUMO

# Lingva ĥaoso

Pro kolero pri tio, ke en ilia profesia asocio oni diskutas kaj korespondas ne nur france sed ankaŭ flandre, germane kaj angle, grupo da franclingvaj belgaj okulkuracistoj fondis propran asocion. Tiuj skismuloj, kiuj inkluzivas sep universitatajn profesorojn, pro lingvaj malfacilaĵoj ne plu vidas en la Belga Oftalmologia Asocio la idealan kadron por scienca interŝanĝo de ideoj.
Mi estis pastro en la Eŭropo Paroĥo en Luksemburgo kaj instruisto de religio en la Eŭropa Lernejo. Kiam ni okazigis tiel nomatan „eŭropan ekumenan diservon", oni predikis en tri lingvoj tri diversajn aferojn aŭ tute nenion; la kantoj, preĝoj kaj petfrazoj estis en kvin lingvoj – aŭ inkluzive la leceburgan kaj la latinan do en sep – la Patron Nian ĉiu preĝis samtempe en sia propra lingvo: la vera Babela Turo! La tuto daŭris minimume unu horon kaj duonon, la infanoj ekdormis, kaj ĉu tiel oni efektive preĝis – tion mi dubas. La preparoj por tia ĥaosaĵo daŭris ses horojn.
La instruista revuo kaj ĉiuj eŭropaj dokumentoj aperas en la ses oficialaj lingvoj – la dana, la germana, la angla, la franca, la itala kaj la nederlanda. La irlandanoj kaj luksemburganoj – bedaŭrinde – libervole rezignis pri siaj gepatraj lingvoj kiel oficialaj. Sed ĉiu paperpeceto, ĉiu dokumento devas esti tradukita en tiujn ses lingvojn, trairas tri kontrolorganojn; ĉiu lingvo havas la propran koloron; ĉiu tria el la miloj da eŭropaj funkciuloj estas tradukisto aŭ interpretisto – tio kostas sennombrajn milionojn, kiujn pagas la eŭropaj imposto-kontribuantoj.



*Konfrontata ĉiutage kun lingvaj problemoj: Esperanto-Centro Luksemburgo*

Kiel tio pluiru? La grekoj kun sia malsama alfabeto staras antaŭ la pordo de la Eŭropa Komunumo, poste venos la hispanoj, la portugaloj, eble la turkoj kaj la nordaj landoj. Kaj ĉiu politikisto jam nun komprenas: la lingvan problemon oni devas solvi – sed kiel? Tion neniu scias! Je la 15-a fojo la Ministroj por Eksterlandaj Aferoj de la 9 EK-landoj kunvenis por interkonsiliĝi pri la eŭropa pasporto. Ili disiris sen fini sian laboron, ĉar ili ne povis konsenti pri la koloro, pri la emblemo kaj pri la lingvoj.
La gazeto „Frankfurter Allgemeine" lastatempe skribis: „Tiu ĉi Komunumo ja certe havas diversajn revojn, sed malantaŭ la montoj da porkaĵo kaj butero, la administraj dokumentoj kaj senfinaj diskutoj, lingvaj revoj fariĝas konkretaj limigoj, koŝmaroj. Rezulte el tiu politika devigo (t.e. la postulo traduki

en ĉiujn oficialajn lingvojn) kun ĉiuj konsekvencaj faktoroj (kostoj, personaro, prokrastado, neprecizeco, juraj problemoj) lingvaj diferencoj efektive fariĝas bariloj.“

Do, kiuj solvoj sin prezentas? En KOMEKON, la orienta ekonomia bloko kun siaj dek lingvoj, oni elektis kiel unusolan laborlingvon tiun de la plej granda kaj potenca partnero, nome la rusan. Konforme al tio, estus do en la EK la germana. Sed aŭdacu nur laŭte aŭdigi tiun penson! Restas la „mondlingvo“, la angla. Mi asertas, ke simple ne estas vere, ke la angla estas tia. Kaj mi kuraĝas veti, ke la eŭropanoj neniam nomos la anglan oficiala kaj sola dua lingvo, dum la francoj (kaj ankaŭ aliaj) ankoraŭ kunapartenos al la EK. Cetere tio ne estus justa. La aliaj ŝtatoj devus elspezi milionojn por instrui la anglan lingvon, kion la angloj ne bezonus financi. Ankaŭ, ĉiu denaska parolanto de la angla lingvo aŭtomate havus avantaĝojn kaj superecon super la aliaj. La popolo, kies lingvo elektiĝis, ankaŭ ekhavus politikan, ekonomian kaj kulturan superpezon. Krome, malgraŭ sia relativa simpleco la angla lingvo kun siaj esceptoj kaj sia nefonetika ortografio ankoraŭ estas tro malfacila por esti flue prolebla far ĉiu eŭropano. Demandinde estas, ĉu valoras la peno?

Restas do pro la nacia ĵaluzemo la trilingveco kiel en Svislando – sed kiujn tri oni elektu el naŭ aŭ pli? La malgrandaj nacioj defendas sin tute prave kontraŭ direktoria sistemo kaj lingva imperiismo.

Ni prenu iun neŭtralan, iun mortintan lingvon – la latinan ekzemple. Eĉ en la Koncilio kaj Sinodo la kardinaloj kaj episkopoj de la katolika eklezio ne povis paroli la latinan.

Ni do daŭrigu kiel ĝis nun: italo lernas la francan, nederlandano la anglan – tiel ni havas du homojn kun kvar lingvoj, kaj ili povas interparoli eĉ ne unu vorton. Ni lernu do laŭeble multe da fremdaj lingvoj, kaj kiam ni vojaĝas aŭ renkontas eksterlandanojn en nia propra lando, ni bezonas bonŝancon por renkonti iun, kiu parolas unu el tiuj lingvoj. Kaj la ceteron ni simple faru per bildetoj, per la manoj kaj la piedoj.


Ne, ni scias, ke tiel ne bezonas esti. Ekzistas ja solvo: la dua komuna kaj neŭtrala lingvo por ĉiu, la internacia lingvo ESPERANTO. En ĝi unuiĝas la facileco de la angla, la profundeco de la germana, la eleganteco de la franca kaj la muzikeco de la itala. Vi, la leganto de ĉi tiu artikolo, kie ajn vi troviĝas, estas ja la vivanta pruvo ke ESPERANTO funkcias. Ne restas alia pli bona solvo! Triksini

## AZIO

# Strato de Amikeco

Rekorde konstrui, jen unu el la karakterizoj de ĉinoj-aŭ kiu ne konus la Ĉinan Muron, admir-objekto de ĉiu vizitanto, ĉu turista, ĉu politika? Nun aldoniĝis en Azio nova rekord-konstruaĵo, sed ĉifoje ne defensa muro, sed apertiga strato: Fine de junio la ĉina vicĉefministro Geng Biao kaj la pakistana registo generalo Zia-Ul-Hake inaŭguris la novan Karakorum-Altstraton. La iama silk-vojo, pasebla nur dum unu monato jare, nun estas uzebla dum la tuta jaro kaj portas la nomon „Alta Strato de Amikeco“.

Nomo konfirmanta la tradicie bonajn rilatojn inter Pekino kaj Islamabado. Sur tiu strategie kaj komerce grava strato jam veturas kamionoj; ili bezonas de Eŭropo ĝis Ĉinio malpli ol tri semajnojn! La nova strato krome faros Pakistano en baldaŭa estonteco tre grava centro de l' internacia transportado. Apud la haveno de Karaĉi vojmontrilo povus indiki: 2200 km al Sinkiango. La dum 20 jaroj de dekmiloj da ĉinoj kaj pakistanoj konstruita strato estas unu el la plej grandaj projektoj de ĉi tiu jarcento. La strato kondukas tra unu el la plej grandiozaj montaraj regionoj de l' mondo. De la pakistana ĉefurbo Islamabado trans Gilgit kaj la regiono de Hunza, ĝis antaŭ kelkaj jaroj ne alirebla, sed fama pro longvivaj homoj. Tra valoj, ege profundaj inter gigantaj montegoj, preter longegaj glacikampoj, trans la 4700 m altan pasejon de Mintako al Kasgaro, finstacio de la ĉina fervojo. Kiam ankaŭ la parto inter Islamabado kaj Karaĉi estos preta kaj do taŭga por pezaj kamionoj, tiu Indus-strato plimallongigos la vojon inter Pacifiko kaj Eŭropo je miloj da kilometroj. Nur por Hinda Unio la nova strato ne estas absolute ĝojiga; ĉar granda parto de l' Alta Strato de Amikeco troviĝas en regiono de Kaŝmiro, kiu laŭ hinda vidpunkto apartenas al la plej granda ŝtato de la subkontinento. Sed la hinda registaro estas sufiĉe realisma, por prisilenti la aferon. Ankaŭ por Ĉinio restas nesolvita problemo: Oni ŝatus havi rektan vojon al Afganujo. Sed por tio momente la politika konstelacio ne estas favora. J.F.



## TELEVIDO

# Malbona konscienco

Post la televida spektaklo „Roots" (= radikoj), impone enscenigita sed mondsferojn fora de vero kaj realo, tial do nur distra televidserio pri negrosklavoj en Usono, baldaŭ tie aperis alia televida sensacio: „Holocaust". Sendube ĝi estas pli vera ĉar pli historia ol „Roots". Temas pri la sorto de juda familio en Hitlera Germanio. Fono estas la ekstermado de l' judoj, vidigata per dokumentfilmoj kaj -fotoj. Tial ankaŭ la titolo: „holokaŭsto" en helena lingvo signifis brulofero, ĉe kiu sur altaro besto estis komplete bruligita. Certe adekvata nocio por la krimoj per kaj sub Hitler, eĉ pli trafa ol genocido aŭ „finsolvo" (kiel Hitler mem nomis la celon de sia batalo kontraŭ judoj).

Tamen eĉ en Usono mem aŭdiĝis multaj skeptikaj voĉoj, des pli en Eŭropo. Ĉefa argumento: ĉu entute oni povas montri kaj demonstri tiel neimageblan eventon alie ol per historia, dokumenta materialo? Alivorte: ĉu oni povas ludi tiajn kruelaĵojn? Kritikantoj, kiuj krome neas artan kvaliton de „holokaŭsto", ne nur trovas multajn historiajn erarojn en ĝi, sed ankaŭ demonstras la neeblecon de ludo tia ekzemple jene: Se en la filmo vivas bonnutritaj aktoroj en koncentrejo, tio impresas ridige, eĉ cinike, se ja en la sama filmo oni vidas historiajn fotojn kaj filmojn kun skeletaspektaj homoj. Fakte en Novjorko iamaj koncentrej-viktimoj demonstris kontraŭ la televidaĵo.

Pro la malbona kvalito kaj la impreso, ke jen nur pro konkurenco de unu usona televida kompanio kontraŭ alia (kiu elsendis „Roots") oni faris sensacian tv-filmon por gajni monon, sed ankaŭ pro principa skeptiko multaj eŭropaj televidaj asocioj malakceptis elsendi ĝin; do oni ne vidos ĝin ekzemple en Francio, Danlando, Svedio, Svislando kaj Aŭstrio. Ke ĝi estos elsendata en Israelo fine de l' jaro, tion ĉiu komprenas.

Sed plej strange kondutas germana televido: oni aĉetis tuj la filmon, tamen ne elsendos ĝin, almenaŭ ne en la unua programo. Ĉu la germanaj tv-ĉefoj sentis moralan devon transpreni „holokaŭston" malgraŭ kvalitaj mankoj, nur ĉar temas pri kulpo germana? Anstataŭ la filmon oni decidis elsendi raporton pri la filmo – ĝi mem estos videbla nur en kelkaj federaciaj landoj, en la tria programo, kiu estas la plej malmulte spektata. „Oni elsendas kaj kaŝas ĝin samtempe, kaj tiel sidiĝas pro nura taktiko inter la seĝoj," komentis germana televidisto.

Skrupulojn, cetere, germanaj televidistoj havis ankaŭ ĉe „Roots", kies elsendon ili akompanis per serio de dokument-filmoj pri la vera sorto de l' negraj sklavoj en Afriko kaj Usono. Sed en tiu kazo la germanoj ja havis bonan konsciencon.

## EKOLOGIO

# Giganta nova diluvo?

Pri „giganta diluvo" fine de ĉi tiu jarcento avertis Aurelio Peccei (pron. Peĉei), prezidanto de „Klubo de Romo". Dum studkonferenco okaze de la dekjara ekzistado de la klubo, kiu famiĝis per studo „Limoj de Kreskado" en 1971, Peccei atentigis pri la rabisma ekspluatado de l' naturo. Se la homaro dum la venontaj dek jaroj ne trovos novan ekvilibron de l' naturo, tia diluvo estos neevitebla. Po jaro oni foruzas arbarojn, kies arealo egalas al tiuj de Danlando, Belgio kaj Nederlando kune. Tial post tridek jaroj ne plu ekzistos sufiĉe da arbaro, kiu zorgos pri la atmosfera ekvilibro kaj estas vivnecesa por homoj kaj bestoj. Tio estas, laŭ Peccei, ekzemplo de l' homara stulteco.

Ne nur oni devus ŝanĝi la ekonomian kreskon, sed la tutan homaran pensmanieron. Politikaj celoj de hodiaŭ ankoraŭ estas plektitaj kun naciismaj pensmanieroj de l' tempo antaŭ tri jarcentoj. Sed la

## KOLUMNO DE LEGANTOJ

Se vi sendas al ni gajan foton (kun mallonga teksto) aŭ limerikon aŭ ridigan preseraron aŭ spritaĵon (eltondaĵon) kaj SEMAJNO ĉi-loke publikigas ĝin, **vi ricevos 10,– gmk!**

Jen la unuaj kontribuaĵoj:



„Kompreneble en SEMAJNO mi legas nur la politikan parton – klare!"

**LIMERIKO**

Jen estis legant' en **Tirano**
kun tre nestabila sano.
Pro tio li en SEMAJNO
legadis pri ĉio kaj ajno.
SEMAJNO estis lia malsano.
(ne de Rikardo Ŝulc)

La gasto plendas ĉe l' kelnero: „Via hundo konstante observas mian manĝaĵon!" Trankviligas la kelnero: „Via manĝaĵo ne interesas ĝin, sed vi havas ĝian teleron."
Helmut Meyer, Aŭstrio

**LIMERIKO** (de Rikardo Ŝulc)

Vizitis turist' **Tel-Avivon**.
Ignoris li mem la motivon.
Kaj li multon supozis.
Je la fin' diagnozis:
„Bezonas mi aperitivon!"

naciŝtata sistemo ne konformas al hodiaŭaj bezonoj, des malpli al estontaj. Sen nova organizado sur plej alta ebeno kaj sen vera solidareco konforma al la reciprokaj dependoj de ĉiuj mondpartoj, ne ekzistos ekonomia estonteco por la homaro. La unuajn paŝojn al „esence etika renovigo de l' mondo" oni devus fari dum la venontaj dek jaroj. Tio estas ĉeftasko por okcidento, kiu respondecas ĉefe pri la ĝisnuna tendenco kaj kiu perdos plej multe, se oni ne ŝanĝas ĉi tiun tendencon.

KOMPUTOROJ

## Ankaŭ por araba lingvo

Malfacilaĵoj ĝisnunaj por lingvoj kun nelatinaj alfabetoj ne plu ekzistas – ĉiukaze ne por komputoroj. Sciencistoj sukcesis ellabori modernan araban alfabeton; ĉi tiu „informa araba" lingvo diferenciĝas de la parolata kaj klasika pro enkonduko de vokaloj, esprimitaj tradicie nur per signoj, kaj pro egaligo de l' 16 skribmanieroj. Evoluigis ĝin marokana profesoro Lakhdar de l' Araba Stud- kaj Esplor-Centro en Rabato. Oni konstruis dulingvan komputoron, kiu povas prezenti tekston kaj en araba kaj en latina alfabetoj. La komputoro, evoluigita de Eŭropa Spac-Organizo, estas uzebla ankaŭ por grekaj, kirilaj kaj hebreaj signoj. Per la komputoro profitos ne nur flughavenoj kaj bankoj, sed ankaŭ televidaj programoj por lernado de fremdaj lingvoj.

AUTOMOBIL-TESTO

## Forta gnomo

El Japanio venas „sovaĝa kato" (Daihatsu „Wildcat"), kiu fakte taŭgas eĉ por plej sovaĝa regiono, por ĉiu tereno, ĉu arbara, sabla aŭ ĝangala. Ĉi tiu gnomo kapablas ĉion bezonatan por universala uzo: grimpi, vadi, salti. Kun larĝeco de 146 cm por ĝi neniu vojeto estas tro malvasta, kaj ĝi majstras deklivojn ĝis 65 procentoj.
Ĝis 50 procentoj ni elprovis – en tiu kazo oni vidas tra la antaŭa fenestro nur ĉielon! Ses personoj trovas lokon kaj ĝi transportas senĝene pli ol tri tunojn. Kaj jen la miraklo: ĝi havas motoreton kun nur 33 kilovattoj (el 1000 kubikcentimetroj). Do pasis la tempoj, kiam pro tre grandaj motoroj la bezinkonsumo kaŭzis tre altajn kostojn ĉe aŭtomobiloj kun kvarrada transmisio. La „sovaĝa kato" pruvas, ke ankaŭ malkare oni povas moviĝi tra pli-malpli sovaĝaj terenoj. Malgraŭ tre solida konstrumaniero (malplena ĝi pesas preskaŭ unu tunon) eĉ la prezo estas modera: En Eŭropo oni pagas proksimume 16.000 gmk por la komplete ekipita veturilo.
Benzinforuzo ankaŭ sufiĉe modera: 15 litrojn ni bezonis en senvoja tereno. Pli grandaj fratoj bezonas duoblan kvanton – kaj ankaŭ ne grimpas pli bone. Sola malavantaĝo, sed negrava por tiu, kiu aĉetas ĝin celkonscie: Pli ol 95 km/h ĝi ne rapidas sur glata strato. Sed por tiuj stratoj oni ja havas aliajn aŭtomobilojn. M. L.




LIBROJ

Sendube estas avantaĝo de la internacia lingvo, ke en ĝi aperas tradukoj el naciaj lingvoj malgrandaj, kiujn oni apenaŭ trovas en aliaj naciaj lingvoj grandaj (fremdaj), des malpli en malgrandaj. Krome mi pli multe fidas al Esperanto-tradukoj, ĉar ilin oni ne faras pro negoco (elektante plej bone vendeblajn verkojn), sed pro funda kono de la propra literaturo. Ĉi tiu karakterizo validas ankaŭ por ĵus aperinta „La kanto pri fajr-ruĝa floro" de finna aŭtoro Johannes Linnankoski. Legante ĝin, oni ekscias pli multe pri vivmaniero, sentimento kaj karaktero de finna popolo, ol perus plej bona priskribo de etnologo. Laŭ indiko de la eldonejo estas „unu el la plej klasikaj verkoj de la finna literaturo". Ĝi aperis en 1905 kaj traktas la Don Juanproblemon. La lingvaĵo en la prozaj partoj supozeble volas peri la originalan kaj tial kelkfoje estas nekutima; prave la tradukintoj klarigas en aldono iujn parolturnojn. La rimoj kelkfoje ŝajnas al mi ne tro grandoizaj. Ciukaze leginda verko kaj tute ne enuiga.
(Johannes Linnankoski, La kanto pri fajr-ruĝa floro, 135 paĝoj, Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10, 30,— fmk aŭ 15,— gmk)
Rezignacio plektita kun espero karakterizas novan poemaron de Auld, kiun oni ja ne devas aparte prezenti. Rezonante pri la Esperanto-movado kaj sia propra laboro por kaj en ĝi, li baraktas inter pesimismo kaj ne facile pravigebla optimismo. Ne malmultaj ekkonos en liaj proprajn spertojn. Kaj ofte li trafe priskribas la sorton de Esperanto en ĉi tiu hodiaŭa mondo – pro kiu evidente suferas tiel sentema poeto kiel Auld. Eble oni ne donu ĉi tiun verketon en la manojn de komencanto; sed „firmaj" esperantanoj kun ĝuo legos ĝin, kial ĝi estas „ideala donaco", kiel diras la eldonisto.
(William Auld, El unu verda vivo, 44 paĝoj, Lingvoponto, PL 119, SF-70101 Kuopio 10, 10,— fmk aŭ 5,— gmk)

# LA PIEDIRANTAJ ANĜELOJ

Georgo Moss vidis la aŭton tro malfrue. Li tute ne havis tempon eviti ĝin, kaj sammomente aŭdis la hurlon de la bremsoj kaj sentis la teruran baton kiam ĝi frapis lin. Tiam ĉio estis nigra.

Li rekonsciiĝis kun stranga sento de bonesto, kaj surpriziĝis je la eltrovo, ke kvankam ankoraŭ sub la aŭto, li sentas nenian doloron. Li elrampis de sia enfermita pozicio, kaj ricevis eĉ pli grandan surprizon. Sur la tuta strato neniu homo estis videbla! Li ĉirkaŭrigardis, kaj jen la aŭto ankoraŭ staris en la mezo de la ŝoseo, – malplena. Pluraj veturiloj staris senmove sur la strato, sed mankis ĉiu signo de homo. Georgo gratis la verton perplekse. Kien iris ĉiu? Kio okazis? Li decidis ekiri hejmen, sed plua enigmo tuj frapis lin; kie estas lia hejmo? Li ne povis memori. Strange! Li bone memoris la nomon de la strato, en kiu li nun troviĝis, kaj sian propran nomon. Nur la hejmon kaj . . . li cerbumis. Nu, ĉiun personan detalon krom la nomo li forgesis! Tamen, la afero estis simpla; li iros al la policejo. Kaj li ekiris.

Dum sia marŝo al la policejo Georgo ankoraŭ neniun vidis. La stratoj estis same malplenaj, kaj ĉio restis senmova. Li eniris la policejon, kaj trovis sin antaŭ malgranda servotablo. Malantaŭ ĝi staris . . . neniu.

„Ĉu iu enestas?" li kriis laŭte, sed ricevis nenian respondon. Fine li rezignis trovi policanon tie, kaj decidis ree eliri. Sur la strato ĉio ankoraŭ staris senmove, kvankam li havis la strangan senton, ke ĉiu veturilo ne staras en la sama loko kiel antaŭe. Li ne sciis, kien iri, do decidis re-promeni al la ejo de sia akcidento. Ankaŭ tie, ĉio restis senmove, sed nun li estis certa, ke la veturiloj ne staras tie, kie ili antaŭe estis. La aŭton, kiu renversis lin, li tuet ne vidis. Li rigardis en ĉiujn starantajn veturilojn, sed ĉiu estis senhoma, kiel ankaŭ la strato mem. Konfuzite li staris kaj ĉirkaŭrigardis.

Subite, per la flanko de l'okulo, li ektrafis movon. Li rigardis en la direkto, kie li kredis esti vidinta ĝin, sed vidis nenion. Ĝuste kiam li estis forrigardonta, li denove vidis ion movantan. Ĉi-foje li klare distingis homan figuron, la formon de viro. Ĝoje li iris renkonti lin.

„Pardonu, Sinjoro," li alparolis lin heziteme. „Ĉu vi scias, kio okazas? Kie estas ĉiuj? Mi vidis neniun dum duonhoro."

La alia rigardis lin kvazaŭ mokete. „Vi estas nova, ĉu ne?" li diris, kaj sen eĉ atendeto por respondo li aldonis, „Venu kun mi; mi baldaŭ klarigos."

Georgo ne havis tempon protesti, ĉar lia nova konato preskaŭ fortiris lin. Cetere, nesciante kie li loĝas, nek kio okazas en ŝajne renversita mondo, li emis mute sekvi, atendante, ke iel ĉio klariĝos.

Subite lia nova amiko haltigis lin ĉe drinkejo, kaj ili eniris. Interne Georgo vidis aron da viroj, kiuj trinkis, ludis domenon, saĝjetis, interparoladis, kaj ĝenerale kondutis ĝuste kiel kutime en tia ejo. La plimulto estis maljunaj aŭ mezaĝaj, kvankam ĉeestis kelkaj junaj.

„Saluton, Tom! Bonan, Roberto!" diris lia gvidanto al konatoj. „Kion vi trinkos?" li invitis al Georgo.

„Duonon da biero, mi dankas," respondis Georgo aŭtomate. Li ĉirkaŭrigardis iom scivole. Subite lia rigardo fiksiĝis. Certe tio estis . . Sed ne povis esti . . . Nu, la simileco ja estis rimarkinda!

„Ĉu vi ne volas vian bieron?" diris voĉo ĉe lia flanko, kaj li kvazaŭ rekonsciiĝis kaj prenis la proponitan glason.

„Kio estas?" demandis lia kunulo. „Vi estas en ia revo!"

„Nenio," respondis Georgo. „Sed . . . Nu, mi ĵus pensis, kiom tiu viro en la griza jako similas al amiko mia, Frank Long.»

„Sed tio ja estas Frank Long."

„Neeble!" La glaso de Georgo faris krakon, remetata sur la tablon. Li estis ĝisfunde ŝokita. „Neeble!" li ripetis. „Frank Long mortis antaŭ tri monatoj!"

„Aŭskultu, karulo," diris la alia, dolĉe. „Mi devas tuj klarigi al vi. Mia nomo estas Dell; Karlo Dell. Antaŭ du monatoj mi havis akcidenton. Mi veturigis mian aŭton laŭ la ĉefstrato, kiam mi renkontis alian, kap-al-kape. Ĉio nigriĝis, kaj tiam . . . mi restariĝis, kaj trovis min sola. Neniu homo vidiĝis! Ĉu vi rekonas tian sperton?"

„Jes, ja! Ĝuste kiel mi spertis hodiaŭ!"

„Ĝuste. Kaj ĉu vi ne povas diveni, kio okazis?"

„Tute ne."

„Eĉ ne kiam vi vidas Frank Long ĉi tie?"

„Sed tio ne povas esti Frank Long. Frank Long estas mortinta!"

„Ni ĉiuj estas mortintaj!"

„**Kio**?" La vorto elflugis kvazaŭ elpafita.

„Ĉu vi ne komprenas? Vi mortis en via akcidento. Kaj nun vi ne povas vidi la vivantojn, – kaj ili ne povas vidi vin. Via kadavro, laŭ ilia vido, jam estas forportita. Sed gajiĝu! La mortinteco ne estas tiel malbona; oni povas sufiĉe amuziĝi. Kaj poste, kiam vi ricevos la vidpovon, laŭ onidiro vi povos bone interesiĝi kaj amuziĝi. Nu, ĉu vi volus paroli kun Frank?" kaj neatendante respondon, li vokis, „Hej, Frank! Venu, mi petas! Jen konato via."

La viro, kiun Georgo jam rimarkis, stariĝis kaj transiris la ĉambron. Li rigardis scivole Georgon, kaj tiam lia vizaĝo heliĝis.

„Nu, Georgo!" li ekkriis. „Jen plezuro! Kiam vi aliĝis?"

„Aliĝis . . .?" diris Georgo, dubeme.

„Mortis," klarigis Karlo Dell.

„Ho . . . Nur ĵus; antaŭ . . . nu, mi ne scias. Eble antaŭ unu horo."

„Li ankoraŭ nenion komprenas," diris Karlo. „Mi ĵus informis lin, kio okazis al li. Li aliĝis per aŭto-akcidento."

„Ha, povrulo! Nu, vi baldaŭ alkutimiĝos. Sed ĉi tiu ejo fermiĝos ▷

post kvin minutoj," li aldonis al Karlo. „Ĉu ni iru al la klubo? Tie ni povos alkutimigi lin en komforto."
„Bona ideo!" kaj Karlo stariĝis. „Venu, Georgo. Ni kondukos vin al la 'Piediranta Anĝelo!'" La tri viroj iris al la pordo kaj eliris sur la straton. Denove Georgo rimarkis, ke ĉiuj veturiloj staras senmove.
„Kial la trafiko estas ĉiam senmova?" li demandis.
„Ĝi ne estas," respondis Frank. „Ŝajnas tiel al vi, ĉar vi estas ekster la monda tempo. Kiam vi alkutimiĝos, vi vidos ĝian movon. Fermu la okulojn kaj poste rerigardu."
Georgo obeis. Kiam li rerigardis li rimarkis, ke ĉiu veturilo moviĝis iom antaŭen. Li ripetis la eksperimenton, kaj denove ĉio ŝajne moviĝis dum li ne rigardis, sed restis senmova se li rigardis ĝin.
Post iom da marŝado, dum kiu Georgo ripete fermis kaj malfermis la okulojn por observi la strangan trafikan fenomenon, Frank fingromontris al granda oficeja konstruaĵo.
„Jen ni," li diris gaje dum ili eniris. „Bonvenon al la 'Piediranta Anĝelo.'"
„Sed ĉi tio estas la oficejaro de Dale kaj Kompanio!"
„Jes, sed ni uzas la ĉambron de la direktoroj."
Je tiu momento Frank malfermis pordon, kaj ili trovis sin en sufiĉe granda kaj luksa ĉambro, plena de viroj kaj virinoj. Kune ili eniris, kaj sidiĝis en angulo.
„Nun," diris Georgo, „bonvolu klarigi!"
„La afero estas jena," diris Frank. „Kiam vi aliĝas, – mortas, kiel diras la vivantoj, – vi ne povas vidi ilin, nek ili vin. Tial vi povas iri kien ajn, kaj trovas ĉiun lokon senhoma. Sed post iom da tempo, – eble ses semajnoj ĝis du monatoj, – vi akiros la povon vidi la vivantojn, kiuj aspektas iomete fantomeskaj. Nur iomete, kaj oni devas alkutimiĝi al la kapablo. Unue oni konfuzas vivantojn kaj mortintojn, sed poste oni povas sufiĉe facile distingi ilin. Estas pro tio, ke ni devis forlasi la trinkejon; ĝi estas malfermiĝonta al la publiko, tio estas, al la vivantoj, kaj kvankam vi ne rimarkus la diferencon, al ni vidpovuloj estas iom embarase, ĉar ni vidas ambaŭ tipojn. Do por ni la trinkejoj fermiĝas, kaj ni kutime venas al unu el la kluboj. Ĉi tiu, la 'Piediranta Anĝelo', estas en la direktora ĉambro ĉi tie ĉar ĝi estas granda, komforta ĉambro, kaj la direktoroj kunvenas nur unufoje ĉiumonate, tiel, ke ni estas liberaj dum la restaĵo de la tempo."
„Sed ..." Georgo hezitis. Estis tiom por demandi, ke li apenaŭ sciis, kie komenci. „Nu, unu, kial 'La Piediranta Anĝelo'?" li balbutis.
„Kial ne? Se ni ne estas anĝeloj, kio ni estas? Kaj ni devas piediri ĉien ajn, ĉar ni ne povas funkciigi la veturilojn."
„Kaj .. " rekomencis la tre konfuzita Georgo, „ŝajnas esti malmultaj el vi, – el ni, konsiderante, ke tiom da milionoj jam mortis. Kie ili estas?"
„Ha, jen mistero. Post iom da tempo, – ĝi varias inter ses monatoj kaj du jaroj, – oni akiras novan povon. Oni povas translokiĝi sin per la volo. Tio multe plifaciligas la vivon, sed iel okazas, ke tre baldaŭ oni sentas nerezisteblan impulson iri ien alian. Mi ne scias kien. Antaŭ du tagoj nur, amiko mia iris. Subite li diris, 'Mi devas iri, Frank.' Mi demandis kien, sed li respondis nur, 'Mi ne scias; nur ke mi devas iri.' Kaj li iris."
„Kaj kiel oni oku pas la tempon? Kion oni faras? demandis Georgo.
„Tio estas sufiĉe simple direbla," respondis Karlo, prenante la parolon. „Dum la bierejoj estas malfermaj, multaj el ni kunvenas tie kaj ludas; alitempe ni venas ĉi tien; ofte ni iras teatron aŭ kinejon, aŭ al futballudo, aŭ ..."
„Kiujn teatrojn kaj futballudojn?"
„Iun ajn al kiu oni estas volonta piediri."
„Ludojn de vivantaj teamoj?"
„Certe!"
„Sed ni ... almenaŭ laĵus-mort ... mi volas diri la ĵusaliĝintoj, ne povas vidi la vivantojn."
„Ho, tio ne gravas. La vidpovuloj volonte akompanas kaj faras komentarion. Kompreneble, tio ne taŭgas en teatro aŭ kinejo, sed en ludejo ĝi bone servas. Kaj vi baldaŭ kapablos mem vidi."
„Kaj plue," ridis Frank, „kiam vi havos la vidpovon, vi povos iri ien ajn. Estas ege amuze, kion oni vidas en privataj domoj kaj ĉambroj. Neniu pordo povas esti ŝlosita kontraŭ ni; ni eniras facile, kaj la vivantoj eĉ ne vidas, ke la prodo malfermiĝis. Ho, mi bone amuziĝis en 'ŝlositaj' ĉambroj!"
„Frank, vi estas fripono," diris Karlo. „Ne delogu novaliĝinton de la virta vojo!"
„Nu," respondis Frank, „mi ne scias, ĉu necesas delogi ... Tamen, ni renkontiĝos morgaŭ, Georgo, kaj mi ĉirkaŭkondukos vin, se vi volas."
Georgo danke akceptis la proponon, kaj la parolado daŭris amike. Liaj du kunuloj prezentis lin al diversaj aliaj personoj, kaj li baldaŭ komencis senti sin ano de rondo. Kiam fine venis la horo por disiĝi, Georgo faris unu demandon kiu sporade ĝenetis lin dum la vespero.
„Kie mi dormu?" li diris. „Mi ne memoras, kie estas ... estis ... mia hejmo."
„Neniu el ni memoras tion," respondis Frank. „Sed ne ĝeniĝu. Oni dormas ie ajn, – kie oni trovas bonan liton. Memoru, ke neniu pordo povas esti ŝlosita kontraŭ ni; almenaŭ, nur fare de alia mortinto. Sed la vivantoj ne povas elbari nin. Mi mem ĉiam elektas amuzan dormejon ..."

* * * * * * * * *

Pasis du monatoj, kaj venis la tago kiam Georgo unuafoje ekvidis la fantomajn formojn de vivantoj. Unue la vido timigis lin, sed feliĉe Karlo estis kun li, kaj tuj klarigis al li, kio okazas. Grade li alkutimiĝis al la vido kaj trovis, ke li povas ankaŭ aŭdi la ordinarajn sonojn de la vivo. Sed li ĝojis, kiam ili atingis la klubon, kaj li povis esti certa, ke ĉiu tie estas samspeculo. Hazarde, la tago estis sabato, kaj kiam li diris al Frank, ke li komencas vidi la vivantojn, tiu proponis, ke ili vizitu futbalkonkurson posttagmeze, por ke Georgo spertu la plezuron denove mem vidi la ludon. Frank intencis viziti amikon tagmeze, sed promesis renkonti Georgon en la urbocentro je la dua horo. Do Georgo pasigis la intertempon en la klubejo. Li jam delonge konstatis, ke al mortinto ne necesas manĝi, kvankam li povas se li volas.

Je la horo por ekiro, do, li forlasis la klubon kaj iom hezite paŝis sur la straton. Dum li marŝis li pli kaj pli alkutimiĝis al la vido de la homamaso, kaj la bruo de la trafiko, kaj trovis, ke li sufiĉe senzorge povas promeni. Li komencis ĝui la vivon, – aŭ pliĝuste la mortintecon. Fajfante gajan arion, li ektransiris la straton.
Georgo vidis la aŭton tro malfrue. Li tute ne havis tempon eviti ĝin, kaj sammomente aŭdis la hurlon de la bremsoj kaj sentis la teruran baton kiam ĝi frapis lin. Tiam ĉio estis nigra.

* * * * * * * * * *

Li rekonsciiĝis en malsanuleja lito. Malfermante la okulojn li vidis flegistinon, kiu palpis al li la pulson, kaj . . . sian edzinon, kiu sidis apud la lito. Kiam li rigardis ŝin, ŝi ridetis larmokule.
„Ho, Georgo!" ŝi diris; tiam al la flegistino: „Li rekonsciiĝis!"
„Jes," respondis la alia virino. „Nun li resaniĝos. La kuracisto diris, ke se li rekonsciiĝos nun, li estos savita."
„Ho mia karulo," lia edzino diris, karese, „dank' al Dio ke vi vias. Mi kredis, ke vi jam mortis!"
Georgo sukcesis rideti. „Ankaŭ mi!" li flustris.

## KONGRESOJ EN SEPTEMBRO

**2a-9a de okt**: Int. **Ferioj** en Maria Alm, **Aŭstrio** (adr. Monda Turismo, Stiegerg. 6/22, A-1150 Wien)
**3a-16a**: 15a Int. E-**feriado** „Ora Pola Aŭtuno" en Miedzygórze, **„Pollando** (adr. Juventur, Jagiellońska 12, PL-85-067 Bydgoszcz)
**8a-10a**: Int. **Foira** Renkonto en Plovdiv, **Bulgario** (adr. Pk. 184, BG-4000 Plovdiv)
**15a-29a**: Nigramara E-**Feriado** en Nesebar, **Bulgario** (adr. Distrikta Komitato de BEA, pk. 30, Smoljan)
**29a-1a de okt**: 12a **Kultura** Semajnfino en Blieskastel-Niederwürzbach, **FR Germanio** (adr. Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler)
**30a-1a de okt**: 20a **Kataluna** Esperantista Renkontiĝo en **Tortosa** (adr. Centro de Esperanto, Apartat 407, Sabadell, Barcelona, Hispanio)

HOBIO DE L' SEMAJNO

# Bukedo nevelkema

Kio en Japanio estas Ikebana, en Alpo-regionoj estas bukedoj nevelkaj; klare, ĉar tie dum la severaj vintroj ne ekzistas florantaj plantoj. Tial la virinoj produktas bukedojn el sekigitaj planto-partoj, paperaj floroj, fruktoj kaj semoj, sed ankaŭ perloj, sukerpecoj, nuksoj kaj multaj aliaj naturaj aŭ artefaritaj dekoraĵoj. Tiel ankaŭ dum la senflora sezono oni povas ĝoji rigardante belajn, kolorajn bukedojn.
Kial nur en regionoj de Alpoj? SEMAJNO invitas vin, imiti la virinojn de tiu regiono – kaj vi trankvile uzu materialon de plantoj, kiuj hejmas ĉe vi. Nur vi devas atenti, ke ĉi tiu materialo ĉe l' uzado jam estas seka kaj sensuka. Ekzemeple ne uzu freŝajn semojn de kukurbo por formi floron, sed rostitajn, almenaŭ sekigitajn.
Ĉefa principo: Por produkti artefaritajn florojn el natura materialo, vi bezonas flor-draton; ĝi estas






la nova tigo kaj tenas florkronojn, nuksojn, perlojn ktp. La florfoliojn tondu el krispa papero, en la mezo formu buleton el alikolora papero (t.n. silk-papero taŭgas), ĉe l' suba fino volvfiksu ĉion per la drato. Ludu via fantazio!
Stelformajn florojn vi povas produkti jene: Tondu malgrandan cirklon el fortika papero, boru trueton en la mezo, tiru draton tra l' trueton kaj fiksu ĝin per gluaĵo. Ĉe la marĝeno gluu semojn (taŭgas kukurbaj aŭ maizaj), en la mezo papavsemetojn: preta estas tre „natura" floro!
Diversajn pinglarbajn fruktojn same fiksu per drato; ilin vi ankaŭ povas orkolorigi, kio donas apartan aspekton; aliaj fruktoj pli bone aspektas, se vi surmetas arĝentan farbon.
Aldonu sekajn herbojn, kardojn, frumentojn, k.s. plantojn. Por doni al la bukedo freŝan aspekton, vi bezonas verdajn sekplantojn. Demandu ĉe via ĝardenisto, kiuj taŭgas por tio.
Vi ankaŭ povas aĉeti ekz. pometojn (el plasto) kaj florojn el silko. Por imiti malgrandajn berojn, vi uzu diverskolorajn perlojn lignajn aŭ vitrajn. Tre bone ankaŭ taŭgas diversaj spicaĵoj (kompreneble ne muelitaj!).
Se vi havas ĉiujn unuopajn florojn pretaj, kunigu ilin al bukedo kaj volvu per drato; ekstere metu verdan krispan paperon, tiel ke



oni ne vidas la dratajn tigojn. La bukedo devas esti sufiĉe dense aranĝita, por ke ĝi bone aspektu. Necesaj instrumentoj: tondilo, drat-tenajlo, universal-gluaĵo.
Multan plezuron!


**Ni kuraĝas** hodiaŭ, ne la unuan sed la nulan fojon saluti vin. Cerbumante kion skribi por la nula eldono ni decidis, ke ne valoras peni por 0 sed prefere tuj komenci konatigi nin. Unu el ni estas Analisa, 12-jara knabino kiu loĝas en Cagliari. Tiuj, kiuj jam traktis Italion en geografio scias, ke Cagliari estas la plej granda urbo sur la insulo Sardio, sed prefere prenu mapon kaj kontrolu tion.
La enloĝantoj parolas italan kaj multaj scias krome unu el la sardaj lingvoj. Nian lingvon lernis Analisa en la lernejo kaj nun vi povas ĉeesti unu lecionon. „Hodiaŭ ni volas surbendigi la scenon, kie Petro rifuzas preni sian medikamenton", klarigas Nino, la instruisto. Analisa, Torre, Lucia kaj deko da gejunuloj konsente jesas. „Prenu viajn kajerojn kaj komencu legi." Analisa metas grandan kajeron kun dikaj paĝoj sur la tablon kaj mi ne vidas presitajn literojn nek bildojn sur ĝi. Sed multaj reliefaj punktoj kovras la paĝojn kiuj laŭ certa ordo estas vice elpremitaj el la papero. Vi certe jam divenis, ke estas legolibro en la brajla skribo por blinduloj, el kiu ili nun ludas skeĉon. Rapide glitas la sentemaj fingroj de Analisa trans la paperon. Ŝi uzas ambaŭ manojn por legi kaj mi ne povas diveni, kiuj fingroj deĉifras la literojn kaj kiuj kontrolas aŭ kondukas. Mi provis legi kelkajn literojn kaj konstatis, ke ĉiuj devenas el sama skemo. Imagu ĵetkubon kaj de ĝi la flankon kun la 6 punktoj. Vi scias, ke estas 3 vicoj kun po 2 punktoj. El tiuj 6 punktoj eblas fari la tutan alfabeton, ĉiujn ciferojn kaj interpunkcion. Eĉ muziknotojn eblas „legi" tiamaniere. Ekzemple: supra maldekstra

| | | |
|---|---|---|
| punkto reliefe elpremita | = | A |
| 2 punktoj, unu sub alia | = | B |
| la 2 supraj punktoj | = | C |




Cetere, tiu skribo havas jam pli ol 150 jarojn kaj ĝia eltrovinto, franco Louis Braille, blindiĝis nur 3-jara. Dum lia tempo oni uzis ŝablonon por elpremi la punktojn. Ili devas ja esti tre akurate faritaj. Nun ekzistas skribmaŝinoj per kiuj oni povas brajle skribi sed por ni estas plej simple kontakti Analisa kaj ŝiajn kunulojn per sonkaseto. Ĉu vi volas?
Sendu ĝin al la
Scuola Elementare Statale per Ciechi
Via Nicolodi 100
I-09100 CAGLIARI

**Ni kuraĝas** faldi
Prenu molan poŝtkarton kaj kunfaldu ĝin laŭlonge, denove malfermu ĝin kaj ĉiun duonon ankoraŭfoje faldu laŭlonge en la saman direkton. Post sternado faldu nun laŭlarĝe, sammaniere, sed ne de-




nove sternu ĝin. La duobligitajn 4 angulojn faldu nun ĝis la videbla faldostreko (forte premu pro la dikeco de la kartono) kaj la inter-



*Kion aĉetis la sinjoro sur la pul-foirejo? Vi povas kolorigi la koncernan objekton.*

*La sinjoro aĉetis la malnovan kajton.* (presita renverse)

KUIR-RECEPTO

## Brazila Specialaĵo: Feijoada (feŝuada)
**Viandplado kun fazeoloj**

Ĉar ĉi tiu plado postulas certan preparlaboron, faru ĝin prefere por almenaŭ 6-8 personoj. Viaj geamikoj volonte tostos kun vi per „Caipirinha" (brazila brando el sukerkano kun citrono kaj sukero) kaj biero. Kiel kutime ĉe naciaj manĝaĵoj ekzistas 1001 variantoj.
Nepre ĝi konsistu el:
300g da nigraj fazeoloj
1 porka piedo, 1 porka orelo, laŭvole 100g da bovida stomako, po 250g da fumaĵita ripaĵo, malgrasa lardo, sekigita porkaĵo, 375g da bovida femuro (sen ostoj), 1 malgranda peklita bovida lango, 250 g da ajla kolbaso,
1 granda cepo, kelkaj karotoj, 1-2 ajlbulberoj, 3-4 ruĝaj kapsikoj sensemigitaj kaj tranĉitaj, 1 kulerpleno da oleo aŭ margareno.
Vi procedu jene: Kovru la fazeolojn kaj same, sed en alia poto, la salitajn viandopecojn per malvarma boligita akvo kaj trempadu ilin dum la nokto. Uzu la trempoakvon por kiuri en diversaj potoj la fazeolojn kaj la viandon, al kiu estas aldonita la bovidaĵo. La legomo devas esti kovrita per akvo, se necese aldonu akvon. Finu la kuiradon, kiam fazeoloj kaj viando estas preskaŭ molaj. Elprenu la fazeolojn kaj la viandon, tranĉu la viandon en porcioj kaj metu ĝin kun la fazeoloj kaj nova akvo kaj la karotoj en poton. Stufu nun ĝis ĉio estas bone kuirita.

najn mallarĝajn flankojn faldu trans la ĵus falditajn angulojn. Nun suprenigu la flankajn vandojn kaj laste faldu forte la kesteto-angulojn. Ĉu vi jam scias kion enmeti?

**Ni kuraĝas** ridi!
„Kion vi kaŝas en via mano?"
„Se mi volus ke vi sciu, mi ja ne kaŝus ĝin!"

„Kial la cikonio staras sur unu piedo?" „Se ĝi levus ambaŭ piedojn, ĝi falus."

## DE L' SEMAJNO

Duona horo antaŭ la surtabligo brezu en la oleo la hakitajn lardon, cepon, kapsikojn, kolbason kaj ajlon, aldonu tason da fazeola kaĉo kaj iom de la brogaĵo. Miksu ĉi-lastan kun fazeoloj kaj viando kaj stufu ankoraŭ kvaronhoron. Aldonu freŝan petroselon kaj ĵus muelitan pipron.
Kune vi manĝu: rizon, sabelikon (aŭ alian verdan brasikon), kasavon kaj oranĝojn.
*Kvankam tiu ĉi manĝo ne korespondas en ĉiuj punktoj al la postuloj de moderna sanigkonscia kuirarto, ĝi tamen estas tre riĉa je ĉiuj necesaj nutrofaktoroj kaj mi povas rekomendi ĝin varme al ĉiuj sanaj personoj. Homoj, kiuj korpe laboras, ĉiukaze bone digestas ĝin; personoj kun delikata stomako, malfacila digesto aŭ eĉ hepatmalsano evitu ĝin. La bazaj ingrediencoj – fazeoloj kaj viando – entenas abunde proteinojn bezonajn por ĉiuj vivprocesoj.*
*Maria Becker-Meisberger*

**Dommastrinoj atentu!**
**La supran kuir-recepton ni – kompreneble – ricevis de brazila dommastrino; al ŝi SEMAJNO pagas 10,– gmk. Estonte ankaŭ vi povas ricevi ĉi tiun sumeton, se vi sendas al ni specialan kuir-recepton el via hejmlando kaj la kuiristino de SEMAJNO, Maria Becker-Meisberger, akceptas ĝin por publikigo. Ŝi, cetere, ĉefe atentos ankaŭ la san-aspekton de l' nutrado, kiel vi vidas.**
**Sendu vian recepton al SEMAJNO, S. Maul, Singerstraße 1/III, D-8900 Augsburg FR Germanio**

# KVIN DEMANDOJ

### al vi persone:

1. ĉu plaĉas al vi SEMAJNO, kvankam ĉi tiu ekzemplero estas neperfekta provnumero?
2. ĉu vi opinias kun multaj aliaj esperantistoj, ke ĉi tiu magazino nepre aperu ekde 1979?
3. ĉu ankaŭ vi kredas, ke SEMAJNO pligrandigos la reputacion de la internacia lingvo?
4. ĉu vi kiel kosmopolito vidas la avantaĝojn de rektaj kaj aŭtentikaj informoj per SEMAJNO?
5. ĉu vi estas scivolema pri la pliaj numeroj de SEMAJNO kun interesaj serioj, raportoj, distraĵoj?

Se vi respondas al nur unu el tiuj kvin demandoj per JES, vi certe abonas tuj, eĉ se vi eble diras: „Multekosta!" Sed bona kvalito havas sian prezon. En mia lando unu skatoleto da cigaredoj ankaŭ kostas 3,00 gmk. Kaj mi asertas: Komparon inter la enhavoj de ambaŭ produktoj nepre venkas SEMAJNO!

Do ne hezitu eluzi la avantaĝojn de subskripcio:
Se vi abonos por 1979 ĝis la **15a de decembro 1978** (dato de la poŝtstampo), vi pagos por la unua jarabono ne 150,00 gmk sed **nur 132,00 gmk**, do ricevos 6 numerojn de SEMAJNO senkoste.
Montru ĉi tiun numeron de SEMAJNO ankaŭ al viaj amikoj, konatoj, en la E-grupo, ĉe kongresoj kaj kunvenoj. Certe ankaŭ aliaj esperantistoj volas havi ĉi tiun numeron, por ĝui la avantaĝojn de subskripcio. Ili pagu 3,00 gmk al unu el la kontoj de SEMAJNO (aŭ sendu 4 internaciajn respondkuponojn, se alie ili ne povas pagi). Ĉe mendo de pli ol 5 ekzempleroj oni krome ĝuas rabaton de 10 %.

Stefan Maul
direktoro de SEMAJNO

Eltondu kaj sendu al SEMAJNO, S. Maul, Singerstr. 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio

– – – – – – – – – – – – – – – – – –

## Subskripcio por jarabono 1979

de SEMAJNO

(Skribu klare aŭ maŝine!)

nomo ________________ antaŭnomo ________________

strato, poŝtfako ________________________________

poŝtkodo, urbo ________________________________

lando ________________________________

Mi abonas la magazinon SEMAJNO por la daŭro de unu jaro. Se mi ne malabonos minimume kvaronan jaron antaŭ la fino de la abon-daŭro, aŭtomate renoviĝas la abon-kontrakto por unu plia jaro.
Mi pagos la kompletan sumon de 132,00 gmk por 1979 tuj post ricevo de la unua regula numero de SEMAJNO.

Mi volas kunlabori ĉe SEMAJNO kaj petas instrukciojn* ☐

Mi notas dorsflanke adresojn, kien vi sendu varbilojn* ☐

dato ________________ subskribo ________________

* Metu kruceton, se vi faras tion!
(ĉi-subajn rubrikojn ne plenigu!)

Abon-kodo ☐☐☐☐☐☐☐☐☐☐ pagoj ☐☐☐☐☐☐☐☐☐☐

SEMAJNO volas aktivigi vin

## Ekzistas multaj eblecoj, kunlabori ĉe SEMAJNO!

Se vi trafoliumas ĉi tiun numeron, vi trovos kelkajn instigojn **aktiviĝi** por SEMAJNO – kaj por iuj aktiveco eĉ atendas premioj. Vi povas sendi kuir-receptojn, fotojn, unikaĵojn kaj preserarojn (kompreneble nur el nia ŝatata E-revuaro!), vi povas kompili limerikojn aŭ viajn memoraĵojn pri pli fruaj tempoj, vi povas solvi enigmojn – kaj vi kompreneble estas kore invitata, sendi leterojn taŭgajn por aperigo! Vi ankaŭ povas priskribi vian ŝatokupon aŭ hobion. Infanoj kaj gejunuloj povas sendi specifajn kontribuaĵojn.

Tute alia ebleco, kunlabori ĉe kaj por SEMAJNO, estas **varbi** abonantojn. Ekzemple vi povas atentigi pri SEMAJNO viajn leteramikojn kaj korespondantojn, viajn klubkamaradojn kaj grupanojn (al ili eĉ montri vian ekzempleron). Vi ankaŭ povas peti de SEMAJNO varbilojn kaj distribui ilin aŭ ĉementi en viaj leteroj. La malgranda flugfolio de SEMAJNO havas grandecon de 10 × 15 cm kaj pesas nur kelkajn gramojn. Kaj vi povas sube noti adresojn, al kiuj SEMAJNO mem sendu varbilojn.

Kompreneble vi ankaŭ povas **donaci** abonon de SEMAJNO al amiko, ankaŭ jam dum la subskripcia kampanjo. Por tio uzu suban kuponon (dorsflanko de via abonilo.).

Sed fine vi ankaŭ povas konstante kunlabori **verkante** por SEMAJNO, kiu kompreneble pagas honorariojn. Se vi deziras tion, metu kruceton sur via abonilo kaj ni sendos al vi koncernan cirkuleron. Ni bezonas kunlaborantojn en ĉiuj landoj kaj ĉiuj fakoj.

Kiamaniere vi aktivos?

Mi donacas jarabonon 1979 de SEMAJNO al:

nomo ______________ antaŭnomo ______________

strato ______________

poŝtkodo, urbo ______________ lando ______________

Sendu varbilojn por SEMAJNO al jenaj adresoj:

1. ______________
2. ______________
3. ______________
4. ______________
5. ______________

Mi petas ________ * varbilojn por mi mem

* indiku la nombron

TURISMO

### KURACLOKO

## Morta Maro viviga

75 kilometrojn orienten de la Mediteraneo trans la montĉeno de Judeo troviĝas montbreĉo 1000-1200 metrojn profunda. En ties fundo 400 m sub la mara nivelo troviĝas lago 78 km longa kaj 17 km larĝa, nomata Morta Maro. Ĝi estas en la plej profunda loko en la mondo. Varmeco, sekeco de la aero, sala akvo, ekologie pura aero kaj pitoreska ĉirkaŭaĵo faris de tiu loko tre vizitindan kuraclokon.

La temperaturo dum somero atingas tie 45 centigradojn. La mara akvo enhavas 28-32 % de diversaj saloj (natrio, kalio, bromo, sulfatoj, sulfuro kaj kalcio). La akvo estas tiel peza pro la koncentriĝo de la salo, ke la homo tute ne devas scii naĝi por ne droni. La bananto povas senmove kuŝi en la akvo kaj legi ĵurnalon.

La Morta Maro estas atingebla per kelkaj ŝoseoj tra Jerusalemo kaj tra urbeto Arad en la sudo. Ambaŭ ŝoseoj estas 193 km longaj de Tel Avivo. La kuraciga centro troviĝas en la mezo de la okcidenta bordo. Estas tie kelkaj modernaj hoteloj, junulara gastejo kaj pli malmultekostaj loĝeblecoj. Estas ankaŭ eble loĝi en la urbo Arad (600 m super la mara nivelo); tie oni povas trovi diversajn loĝlokojn pli malmulte-kostajn. La kuracantoj povas ĉiutage atingi la maron per aŭtobuso.

Estas du grupoj de malsanoj, kiuj ĝuas efikan helpon en la kuracado tie. La unua estas la grupo de t.n. reŭmatismaj malsanoj: doloroj en dorsaj muskoloj, torikolo (doloroj en la nuko), kronika inflamo de la artikoj (neniam akutaj) diskdegenerado, lumbago, artrozoj. La banado en la varma akvo kun koncentrita salsolvaĵo, ŝlimkuracado, gimnastiko havas kuracigan influon je la supre nomataj malsanoj. La malsanuloj eĉ post longaj monatoj asertas, ke ili trapasis sendolore la vintron. Al la

kuracado helpas aldone tre varma klimato. La varmeco daŭras ne nur dum la tago, sed ankaŭ vespere kaj dum la nokto. La koncentriĝo de la saloj estas pli alta ol en iu ajn alia loko en la mondo. En bankuvo kun 150 l da akvo troviĝas 45 kg de diversaj saloj. En tiu regiono nek la maro nek la aero estas malpurigataj, ĉar en la ĉirkaŭaĵo ne estas urboj kaj vilaĝoj kaj nur malmultaj industriaj entreprenoj. (Malproksime de la kuraccentro.) Estas tie nur unu kibuco, Ejn Gedi, kiu liveras aviadile al Eŭropo legomojn kaj fruktojn jam en la monato februaro.
La alta varmeco de la klimato ne malhelpas al kormalsanuloj kaj al alta sangpremo, ĉar la varma aero kaŭzas abundan ŝvitadon, kiu senigas la homojn de multaj saloj kaj de la fluidaĵoj, kaj tiu efiko estas dezirinda por tiuj malsanuloj. Aldone: pro la profundo de tiu loko la aero estas pli densa kaj ĝi enhavas 20 % pli da aksigeno kaj faciligas la spiradon al tiuj homoj.
Unika tamen estas la kuracado de psoriazmalsanuloj. Tiu malbeliga haŭta malsano kaŭzas multe da malagrablajoj al la malsanuloj, kiuj suferas pro juko, oftaj infektoj de haŭto, malagrabla aspekto, kiu ofte malpermesas al ili establi familian vivon. La malsano ne estas, ĝis hodiaŭ, kuracebla.
La kuracado de tiu malsano ĉe la Morta Maro estas bazita je la fakto, ke la sunradioj kaŭzas longdaŭrajn plibonigojn; bedaŭrinde ili ordinare ankaŭ kaŭzas severajn brulvundojn, kiuj malebligas longdaŭran radiadon de la haŭto.
La sunradioj, kiuj trapasas ĉi tie tavolon da aero 400 m pli dikan ol en aliaj lokoj de la mondo, estas senigitaj de ultraviolaj radioj, t.n. mallongaj radioj, kiuj estas la ĉefa kaŭzo de brulvundoj. Pro tio ne estas danĝere dum longaj horoj ĉe Morta Maro kuŝi sub sunradioj. Tiu radiado, kun banado en la Morta Maro donas longdaŭrajn plibonigojn. Evidentiĝis, ke homoj, kiuj ricevis kuracon ĉe Morta Maro, bezonas multe malpli kuracadon en hospitaloj. La rezulto estas tiel okulfrapa, ke malsanulkasoj de kelkaj eŭropaj landoj repagas elspezojn por la kuracado de psoriazo ĉe Morta Maro (Aŭstrio, Nederlando, kelkaj skandinavaj landoj.)
Por eŭropanoj tamen estas konsilinde, veturi al Morta Maro en aŭtuno, ĉar estas iomete tro varme por ili dum la someraj monatoj, sunradiado en aŭtuno restas tamen same forta kaj la ĉielo ĉiam sennuba kaj senpluva.
La ĉirkaŭaĵo donas multajn eblecojn ekskursi. La roka dezerto kun tropika vegetalaro en la krutaj valoj, kanjonoj, akvofaloj (nur piede atingeblaj), arkeologiaj elfosaĵoj, historiaj memoraĵoj estas tiel abundaj, ke ĝi postulus aldonan priskribon. D-ro H. M.



*Nekutima pejzaĝo, nekutimaj kurac-eblecoj: la Morta Maro havas salojn tre sanigajn por reŭmatismo same kiel speciale por certaj haŭtmalsanoj, kuraceblaj nur ĉi tie*

## JUNULARO

# Trajne al Pekino

La konstanta elpaŝado de Popola Cinio el iama izoleco ebligas viglan vojaĝadon ankaŭ inter Eŭropo kaj Pekino. Sed ĝis nun estis ĉefe diplomatoj, ekonomiistoj kaj komercistoj, parte ankaŭ (riĉaj) turistoj. Intertempe turismaj entreprenoj logas ankaŭ jam junularon per aventurpromesaj ofertoj: Por 3.595,– gmk ekzemple oni povas aĉeti unumonatan vojaĝon de Kolonjo al Pekino kaj returne. Mirige: oni uzas nur trajnojn kaj pro tio la vojon trans Moskvo. De tie la gejunuloj veturas sur transsiberia fervojo al Kasano, Sverlovsko, Omsko, Novosibirsko, Irkutsko ktp. Entute oni pasigas ok tagojn kaj sep noktojn en vagono! Same ĉe reveturado.

Por Ĉinio mem la prospekto promesas vere plenan programon: La plej grandaj urboj estos vizitataj same kiel universitatoj, lernejoj, infanĝardenoj, popolkomunumoj, fabrikoj, malsanulejoj, konstruaĵoj de malnova kaj nova Ĉinio, teatroj kaj muzeoj.

Por la tuta vorjaĝo oni bezonas ne malpli ol kvin vizojn (sume 115,– gmk!). Sed certe multaj gejunuloj (resp. iliaj gepatroj) volonte pagas ĉion, se oni scias: „Pekino deziras la viziton de junaj homoj el Eŭropo," kiel diras la prospekto.

## RADIO-PROGRAMO DE L' SEMAJNO

4a ĝis 10a de septembro 1978 (horoj laŭ la horsistemo de Greenwich; I = informoj, P = parolado, K = kurso)

**ĉiutage:** 05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz). 41.27m (7270 kHz). I.P. 15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P. 21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

**Lundo (4a):** 00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. 01.20-01.30 kaj 02.50-03.00, Lisbono, 31.13m (9635 kHz), 25.42m (11840 kHz), kiel dimanĉe. 18.00-18.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. 22.05-22.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 25.60m (11720 kHz), 19.60m (15305 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.90m (21585 kHz). P.

**Mardo (5a):** 20.30-20.45 Ibra Radio Malto: 50.17m (5979 kHz). I. 22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P.

**Merkredo (6a):** 22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K.

**Jaŭdo (7a):** 17.50-17.55 Vieno, 203m (1475 kHz). I. 18.00-18.15 Berno, ondolonggoj kiel lunde je la sama horo. 22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.


**Vendredo (8a):** 20.00-20.30 Pekino, 43.73m (6860 kHz), 31,98m (9380 kHz), 26.09m (11500 kHz). I. 20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz).

**Sabato (9a):** 11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe. 12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe 16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105 kHz). I.P. 18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo. 20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede. 22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

**Dimanĉo (10a):** 05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840 kHz). I.P. 10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I.K. 11.00-11.30 Pekino, 41m, 30m. I. 12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I. 18.20.18.30 Lisbono, 49.79m (6025 kHz) 30.80m (9740 kHz). I.P. 20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P.

20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48,47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31,17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. 20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 18.20. 23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P.

## KRUCVORT-ENIGMO




## PLIAJ LETEROJ

En si mem la ideo estas tute bona, sed pro miaj 16 jaraj spertoj en profesia Esperanto-laboro mi devas (bedaŭrinde) diri, ke ĝi ne estas realigebla. La merkato simple estas tro malforta. Preskaŭ ĉiu E-revuo baraktas. H.B.

Mia unua penso estis, ke vi ŝvebas en la bluo, ĉar laŭ mi la Esperanto-movado ne kapablas vivteni gazeton kian vi planas. Sed mi pretas fari mian eblon por sukcesigi vian ideon. F.L.

Mi gratulas vin pro via kuraĝo kaj esperas ke vi sukcesos, malgraŭ ĝi ne estas facila entrepreno. H.M.

Certe estas ambicia kaj unika entrepreno viaparte kaj ni helpos kiel eble plej – sed estas terure kosta afero por nia lando pro la malalta valoro de nia valuto! J.B.

## KIU ESTAS?




**portret-enigmo**

En decembro 1978 li fariĝos 60jara. Tiam oni pli ofte legos pri li en gazetaro ol nun, kvankam li plej grave kontribuas al la klopodoj pri paco en la mondo. Fakte dum la lastaj ses jaroj ne okazis internacia konflikto ie en la mondo, kie li ne aperis kiel peranto, serĉante interparolon kun ĉiuj militantaj partioj por kompreni ĉies starpunkton kaj por ebligi inter ili rektajn kontaktojn por paca solvo de la problemoj. Ĉefe en la konfliktoj kaj militoj en Meza Oriento li atingis per siaj bonaj servoj ĉesigon de militagoj kaj la okazigon de packonferenco en Ĝenevo dum decembro 1973, kie li prezidis. Eble lia deveno el neŭtrala lando estas la kaŭzo por lia speciala intereso pri la problemoj de sendependiĝantaj evolulandoj, kiun li manifestis en vojmontraj paroladoj dum pluraj internaciaj konferencoj, kie oni estis invitinta lin kiel reprezentanton de granda internacia organizo. Kvankam lia persona modesteco ne predestinis lin al internacia kariero, li tamen estis preparita al ĝi. Doktorĝinte pri juro kaj fininte diplomatan akademion, li eniris la diplomatan servon de sia lando, estis ambasadoro, ministro, delegito ĉe UN. Sian nunan postenon li transprenis en 1972.

*

Kiu estas? Skribu antaŭnomon kaj nomon de ĉi tiu eminentulo sur poŝtkarto kaj sendu al la redakcio de Semajno antaŭ la 15a de decembro 1978 (poŝta stampo); se estas pluraj ĝustaj solvoj, decidas lotumado pri gajnantoj de l' premioj.

1a premio: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
2a premio: Je la Flanko de la Profeto (libro)
3a premio: Tra l' Mondo (sondisko)

# Rezervita por vi persone

estas ĉi tiu spaco en SEMAJNO! Ekde 1979 ĉi tie SEMAJNO aperigos vian tute **personan** anonceton je speciala, tre favora tarifo. Tio signifas, ke vi mem povas aranĝi, ja produkti vian anonceton. Por tio vi nur bezonas blankan paperon, (sufiĉe) puran skribmaŝinon kun taŭga nigrinka rubando – aŭ legeblan manskribon kaj nigrinkan skribilon.
Por doni al vi imagon, jen specimeno (libere inventita, hazardaj identecoj kun vivantaj personoj estus neintencitaj . . .):

Se vi nepre ne kredas, ke mi bone regas la lingvon, jen la pruvo: Ĉi tiun tekston mi tute sola verkis kaj tajpis! Do bona motivo, korespondi kun mi, ĉar apud la lingvo mi regas multajn aliajn aferojn: muziko, sporto, ŝako. Kiu unua anoncas sin ĉe mi? 17jara gimnaziano Aleksio Bambuso, Pf. 313, XY-Lando

Ĉi tiu anonceto kostus nur 3,92 gmk.

Alia specimeno (libere inventita . . . vidu supre!):

Al ĉiuj miaj amikoj kun fiero mi komunikas, ke mi havas novan familianon: Karlo naskiĝis la 35an de septobro 2111. Ĝoju kun mi! R. Bux



Ĉi tiu anonceto kostus 5,60 gmk.

Certe interesa oferto por ĉiuj, kiuj ne ŝatas tiujn iom nepersonajn kompostitajn anoncetojn kun multaj mallongigoj (p.k., dez.kor., intŝ.bk.).

**Jen do la detalaj kondiĉoj:**
Via anonceto devas esti maksimume 11 cm **larĝa**, ĉar ni povas aperigi ĝin nur en originala grandeco. Literoj, desegnaĵoj, fotoj – do la tuta anonceto – nepre devas aperi sufiĉe nigra sur blanka papero, alie ni ne povas garantii bonkvalitan preson. Vi devas mem kalkuli la prezon kaj pagi antaŭ aperigo.
Personaj anoncetoj ĉi tie kostas 1,– gmk po 10 mm. Al la kalkulita sumo vi devas aldoni 12 % por imposto. Supra (unua) anonceto ekzemple estas kalkulata jene: 35 mm alta = 3,5 × 1,– gmk = 3,50 plus 12 % el 3,50 gmk = 0,42 gmk. Sumo do 3,92 gmk.
Vi pagu ĉi tiun sumon al Eld. S. Maul, Semajno, Augsburg, poŝtkonto Nbg 650 92-858, aŭ (nur el nepagipovaj landoj) per internaciaj respondkuponoj; 1 kupono egalvaloras al 0,70 gmk.
Kaj nun streĉu vian fantazion, elprovu vian aranĝkapablon, demonstru vian desegnarton!
Cetere, precipe por lernantoj bona ebleco, sufiĉe malmultekoste aperigi anonceton.
De tempo al tempo ni faros enketon, por eltrovi la plej plaĉan aŭ fantaziplenan memtrikitan anonceton. La gajninto rajtos senpage aperigi plian anonceton!

Sendu vian anonceton kun indiko „persone" al
SEMAJNO, S. Maul, Singerstraße 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio

# Holiday Inn®

LUKSEMBURGO

BP 512 – Tel. 43.50.51

Ideala situo apud la aŭtoŝoseo, kiu ligas la urbon kun la flughaveno, kaj tuj ĉe la eŭropaj institucioj: Eŭropa Centro, Eŭropa Lernejo, Tribunalo de la Eŭropaj Komunumoj, Parlamento, „Eurocontrol“, Kalkulcentro. Distanco al la urbo 2 km, al la flughaveno 7 km, al la golfludejo 6 km.

260 bruizolitaj ĉambroj, ĉiuj ekipitaj laŭ la konataj normoj de Holiday Inn: 2 dupersonaj litoj, privata banejo, duŝo kaj necesejo, memserva telefono, televido, individue reguleblaj klimatizado kaj varmigado. Infanoj sub 18 jaroj okupas senpage la ĉambron de siaj gepatroj. Litoj por beboj estas senpagaj.

Salonoj por konferencoj, bankedoj kaj ekspozicioj kun 5 ĝis 250 personoj estas ekipitaj per plej bonaj teknikaĵoj.









Nia hotelo jam servis kelkfoje al Luksemburga Esperanto-Asocio, al kongreseto post la Universala Kongreso en Rejkjaviko, al ILEI-kongreso kaj servos ankaŭ al la IKUE-kongreso venontjare. Ni estas ĉiam je la dispono de la esperantistaro. La gedirektoroj parolas la Internacian Lingvon.

◁ Plajn informojn bonvolu peti de la Esperanto-Centro Luksemburgo, PF. 628.